

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER. Redaktoro : D-ro Edmond PRIVAT. Direktoro de UEA : Hans JAKOB.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio : 1, Rue de la Tour de l'Île, Genève.

ENHAVO : Senprofunda miro ; Edm. Privat (161). — Entropio kaj Vivo : Ramon de Salas (162). — Poeto al redaktoro (163). — La evoluo de Siamo (163). — Sekureco kaj senarmigo (164). — La ŝafoj en maron (165). — Nokto : de Mihail Eminescu (166). — Internacia Polica Ligo (167). — Dankon al la svedoj (167). — 23-a U. K. de Esperanto, Krakow (168). — Aktualajo por la gazetaro (173). — Propagando per lumbildoj (173). — Esperanto ĉe Brita Parlamento (173). — Esperanto-Enciklopedio (173). — Esperanto per Svisa Radio (173). — E-ĉambro en pedagogia instituto (173). — Al la E-gazetaro (174). — Oni dankas (174). — Niaj mortintoj (174). — Reklamo - (174). Aldonoj : Oficiala Informilo de UEA n-ro 14. — Bulteno de l'Internacia Labora Oficejo, n-ro 44.

Senprofunda miro

Antaŭ iom da tempo konata pacifisto, vizitinte Genevon, laŭdis la mirindan lingvoscion de la diplomatoj ĉe la Ligo de Nacioj kaj miris pri la bonegaj paroladoj aŭditaj angle kaj france. Li konkludis el tio, ke la problemo pri helpa mondlingvo jam ne estas aktuala.

Ni ne scias, ĉu la bona sinjoro scias mem la anglan lingvon. Ĉiuokaze li ne ĉeestis la lastajn kunsidojn de la konsilantaro, kie oni diskutis la manĉurian problemon, kaj ambasadoro el Tokjo parolis japane en grava momento.

Okazas foje, ke brita delegito devas atendi la francan tradukon de anglolingva parolado por ĝin ekkompreni pro la stranga elparolo. Sed ni ne insistu.

La bona sinjoro prave admiris la talenton kaj edukon de kelkaj profesiuloj, kiuj pasigis dekjarojn en ambasadoraj salonoj de granda ĉefurbo kaj lernis preskaŭ perfektan uzon de grandpotenca esprimilo.

Same li ne devus forgesi merititan admiron al tiuj modestaj sekretarioj, kiuj pacience laboras por prepari aŭ korekti la tekston de la oficialaj paroladoj sur maŝinskribitaj folioj, zorge numeritaj. Estus ja mirinde se per mono, sperto kaj instruo la registaroj ne sukcesus trovi en ĉiu lando du aŭ tri homojn kapablajn bele paroli angle aŭ france!

Tamen la bona sinjoro neglektis atenti je tiuj, kiuj silentas.

Foje la plej gravaj. La respondecaj ŝtatistoj aŭ la reprezentantoj de grandaj partioj ne estas ĉiam lingvistoj. Hejme famaj oratoroj en sia nacilingvo, jen ili devas sidi mute en eksterlando ! Eĉ Sinjoro

Briand nescias anglan lingvon kaj, se la Ligo sidus en Tokjo anstataŭ Genevo, kion li farus sen tradukisto ?

Kiu spertis multjaran observadon de ligaj kunsidoj, tiu scias ke la parolvico kaj influo tie dependas grandparte de tiu diplomatista lingvoscio kaj ke multaj silentoj havas nenian alian klarigon ol la malegaleco, kiu regas tiurilate; vane la ĵurnalistoj serĉus komplikitajn politikajn motivojn.

Al la grandaj potencoj, jam fortaj per armeo kaj ŝiparo, apartenas ankoraŭ tiu nekalkulebla privilegio sin esprimi libere en sia propra lingvo, dum la ceteraj devas paroli fremdlingve.

En diskutoj tio fariĝas foje efektiva maljustaĵo. Mi povus rakonti multon pri tio. Nordeŭropa ministro konfesis iam la jenon post kunveno de grava komisiono, ke li prezentis proponon : « Mia sekretario zorge preparis mian francan paroladon por klarigi la proponon. Ĉio marŝis bone laŭ la manuskripto. Sed jen post mia prelego stariĝas elokventa ŝtatisto. kies gepatra lingvo estas unu el la du oficialaj, kaj li tondre dispecigas ĉiujn miajn argumentojn. Mi ja volus respondi kaj montri liajn erarojn. Sed kiel fari ? Libere kaj senerare improvizi en la fremda lingvo mi tute ne kapablas. Peti interrompon de kunveno por ricevi tempon de preparo ne estis eble. Mia propono estis rifuzita. De nun mi subtenos Esperanton, kiel solvon de la egaleca problemo. Ni bezonas ĝin. »

Se tio estas vera pri kunsidoj diplomataj, kiomoble pli por ĉiuj kongresoj popolaj aŭ sciencaj !

Edmond PRIVAT.

El Naturo kaj Sciencoj

Entropio kaj Vivo.

de RAMON DE SALAS, Zaragoza

Oni scias, ke movo povas fariĝi varmo kaj reciproke, varmo, movo. Same okazas ĉe la aliaj klasikaj formoj de la energio, nome : elektro kaj kemia energio, rilate al movo. Tamen okazas ke dum movo, elektro aŭ kemia energio povas fariĝi varmo kaj fakte, ĉiam estas pli malpli granda kvanto da ili, kiuj perdiĝas pro tiu ŝanĝo. Reciproko ne estas certa ; tial ke, nek kvanton da disponebla varmo oni povas tute igi movo, elektro aŭ kemia energio, nek estas tiel facila tiu lasta ŝanĝo, almenaŭ por la praktikaj aplikoj, kiel la unua. Estas bezonataj, por tio maŝinoj kaj aparatoj ofte komplikaj, por produkti el varmo, movon, elektron k.t.p., dum tiuj ĉi energiaj formoj, senpere kaj kontraŭ niajn intereso kaj celo, fariĝas varmo, almenaŭ parte, laŭ facile sentebla maniero. Varmo do, estas kvazaŭ degeneriĝinta formo de l'energio.

Por ke ŝanĝiĝo de energio okazu, estas necese, ke ŝanĝiĝonta energio fluu aŭ estu transportata de pli alta nivelo, al plimalalta ; t.e. : ke ekzistu diferenco da niveloj (potencialoj), inter kiuj energio povu agi. Tio sama okazas ĉe la varmo : estas necese, ke varmo pasu de loko je alta temperaturo (alta varmnivelo aŭ potencialo), al tiu je malalta (malalta varmnivelo aŭ potencialo). Nu, ekziston de malegalaj temperaturoj kontraŭas la senĉesa, natura paso de l'varmo, de korpo varma, al malvarma per kondukado, radiado aŭ transportado.

Okazas do, ke ĉiuj formoj de fizikokemia energio fariĝas iom post iom nur varmo, kaj ke, ankaŭ iom post iom, malaperas ĉiuj diferencoj de temperaturo. Ni laŭ tio estas venontaj fine al fizika mondo, en kiu nenia formo de energio ekster varmo ekzistos, kaj ke ĉi tiu estas sen la ebla rimedo ŝanĝiĝi alie, pro manko da temperaturaj diferencoj. Ni alvenos en universon tute senmovan, sen iu ajn elektra aŭ kemia fenomenoj, ĉiesamtemperatura, ĉiesamkonsista, en vera, sufokiga, morta kaozo, kie vivo estus neebla. Tiel estos laŭ fizikokemia konkludo la fino de l'universo. Kulpa pri tio estas Entropio.¹

Tamen ekzistas en naturo io krom fizikokemiaj fenomenoj ; io, kio almenaŭ ŝajne malobeas la fizikokemiajn leĝojn ; io, kio ebligas ekzemple, ke nia aero estas nun tiel spirebla kiel antaŭ jarmiloj ; tiu io estas la vivo, tiu ne bone konata « kvazaŭ energio », certe ekzistanta ĉe nia planedo kaj ankaŭ tre verŝajne, ĉe la « kosmo », kie la ĉielkorpoj evoluas laŭ tre misteraj leĝoj, kiuj ŝajne ja similas vera vivo ; vivo de tiuj preskaŭ nekonscieblaj, gigantaj estaĵoj, loĝantaj en senlima spaco.

Ni peni prui niajn asertojn : Se ni konsideras la vegetan vivon, oni tuj rimarkas fenomenon, kiu

kontraŭstaras la ĝeneralan leĝon, laŭ kiu senĉese la energio emas fali de plej alta potencialo al plej malalta ; tiu fenomeno estas la povo, kiun efektivas ĉiu vegetaĵo dum sia vivo, kapti la karbonon el karbona anhidrido, malkonsistigante ĉi tiun atmosferan gason. Ĉio tio ĉi, kun natura temperaturo kaj ne bezonante termometrajn diferencojn, kontraŭe el kio, en tiaj kondiĉoj, okazas ĉe la senorgana mondo, kie karbono emas bruli ; t.e. : kombiniĝi kun oksigeno por formi karbonan anhidridon. Per tiu fenomeno oni vidas, ke estas kreataj de vegetaĵa vivo, altaj kemiaj potencialoj, la lignozo kiu iam brulos kaj produktos ankaŭ altajn temperaturojn, kaj ke tiu koncentriĝo de varmo okazas rekte per vivo, ĉerpanta ĝin el samtemperatura medio.

Iom simile al vegetaĵoj agas elektra fluo dum elektrolizo ; sed kun tiu diferenco, ke dum elektro fariĝas kemia energio, vivo nek ŝanĝiĝas, nek malpliĝas, sed nur kaŭzas ke varmo fariĝu kemia energio ; ĉar vegetaĵoj, kiel oni scias, ĉerpas varmon kaj lumon ; t.e. : varman energion el medio en kiu ili vivadas.

Same okazas rilate al azoto, malkombinema elemento, kiu kontraŭe al kutima fakto, estas fiksata laŭ difinitaj kombinoj de kelkaj, legomspecaj vegetaĵoj, pere de iaj teraj mikroboj, kaj certe ankaŭ, pri ĉiuj vegetaj konsistaĵoj, kiuj emas disiĝi kiam vivo ĉesas.

Tiuj fenomenoj montras klare, ke vegeta vivo agas kiel kaŭzanto de kontraŭeĝa leviĝo je energio, sen tio ke ĝi mem estas energio. Analoge okazas ĉe la besta vivo ; ĉar per ĝi fariĝas la bestaj korpoj, kiuj tuj post morto malkonsistiĝas ; fakto pruvanta, ke nur pro vivo povis ekzisti la dumvivaj kombinoj, el kiuj konsistas iliaj korpaĵoj teksaĵoj. Plej karakteriza fenomeno de l'vivo, de tiu vidpunkto, estas certe la asimilado ; sed ne digestado, nek movado, ĉe kiuj plej multe estas nur, eble, fizikokemiaj fenomenoj.

Ke vivo ne estas per si mem energio, sed kaŭzo por ĝia leviĝo, estas pruvite ankaŭ de la fakto de l'naskado ; fenomeno treege mistera, kiu tute ne ekzistas ĉe la fizikokemiaj energioj, kaj pruvanta ke vivo, rigardata entute, ne malaperas, malgraŭ la senĉesa leviĝo je aliaj energiaj formoj, kiun ĝi efektivas en la vegeta kaj besta mondoj.

Vivo do, ĉe nia planedo, kontraŭstaras la fizikan morton pri kio temis antaŭe, kaj tiu laŭ granda kvanto ; ĉar Dubois kalkulis, ke vegetaĵoj malkonsistigas jare el atmosfero, dum asimilo de karbono, 118.500 milionojn da kilogramoj de karbona anhidrido ; t. e. : 5% el la tuto de ĉi tiu gaso ekzistanta en ĝi, el kiuj nur 2% produktas la besta gento dum spirado.

Ni esploru nun, kio okazas ĉe la stelspaco Ĉi tie ankaŭ ĉio estas ege mistera ; ĉio estas hipotezoj ; ni ekzamenu do, iun el plej versimila, tiun de Russell, kiu supozas ke unue estas nur nebulozo konsistanta el tre maldensa kaj malvarma, kosma materio (gaso el nekonata naturo), parto el kiu iom post iom koncentriĝas, levigante sekve sian temperaturon kaj tiel formante malrapide ĉielkorpon, pli kaj pli helan, kies temperaturo daŭras kreski pro koncentriĝo, ĝis

¹ Entropio = efiko-nekapableco. Signifo kreita de R.J. Clausius. Ĝi estas tiu ĉi ero de interna energio de korpa sistemo, kiu ne estas transformigebla entute en varmon.

kiam perdoj je varmo, pro senĉesa disradiado, al ĉirkaŭanta spaco, fariĝas pli gravaj ol gajnoj, de kiu momento ĉielkorpo komencas dekadenci, fariĝante de blueta, flava, poste ruĝa kaj fine senluma, ĝis tuta malvarmiĝo, ĝis vera morto. Poste, okaze, puŝego kontraŭ alia ĉielkorpo disigas ilin, al nova kosma materio.

Nu, kial okazas tiu koncentriĝo de kosma materio? Ĉar ni rimarku, ke gaso per si mem neniam koncentriĝas, sed nur disiĝas, ĝis kiam disiga forto egalvaloras tiriĝon de materio al materio, en kiu momento ekvilibro regas kaj gaso, sen ekstera kaŭzo, nek plu disiĝos, nek koncentriĝos. Se iu konata, energia kaŭzo okazigus ĉi tiun koncentriĝon, tial ke tiu energio iĝu varmo, gaso ree emus disiĝi; ĉar varma gaso havas pli grandan disiĝan forton, ol malvarma.

Plifacile klarigebla estas tio, se kosma materio konsistas el polvo devenanta de kontraŭpuŝego inter ĉielkorpoj.

Tamen, jam eltrovo de Mac Millan pri liaj kosmaj radioj, komplikas la aferon. Tiuj kapablas formi la radian energion. Unue atomoj, poste, kuniĝantaj laŭ molekuloj, kosma polvo kaj nebulozoj, kiuj, siavice, naskos stelojn. Ĉar tie ĉi estas ne nur fakto, ke iu energio fariĝas alia, sed ankaŭ, ke energio fariĝas materio kaj reciproke; same, kiel opinias Einstein kaj preskaŭ ĉiuj modernaj scienculoj. Sed tiam oni ne devas plu paroli, pri tio ke ĉiuj energiaj formoj nepre fariĝas nur varmo; ĉar ankaŭ fariĝas materio kaj materio ree energio.

Se ekzistas do por tio, iu ajn ekstera kaŭzo, kiu ne estas vulgara formo de energio, kial ni ne rajtas ĝin nomi « vivo »? Kompreneble, vivo tute diferencas al tio de ni konata ĉe nia planedo, sed vivo almenaŭ, laŭ senco de kaŭzo por altiĝo aŭ renaskiĝo je la energio; hipotezo kiu konsentas kun la vulgara diro « naskiĝo, vivo kaj morto de steloj ». Tio plie apogus teorion de Arrhenius, kiu malkonsentis kun Clausius pri ties nepra morto del'universo, t.e.: pri ĝia neeterneco; ideo eĉ tute ne konsciebla por homa menso.

Vivo tiel estus io pli supera; ĝi estus kvazaŭ patrono de la energio.

Poeto al Redaktoro

De E. H. Ede.

Ne reagu per cinika
Ronko, nek per jeto brika,
Al la kapo romantika

Del' Poeto;

Ĉar kritiko — se fizika —
(Ova, kota, aŭ brasika)
Ŝajnas iom mallubrika

Por Soneto!

Bonvenigo retorika,
Malkritika, katolika,
Jen, por io ajn lirika

La Sekreto!

La evoluo de Siamo

De HELMUT V. GLASENAPP.

La reĝlando Siamo estas nuntempe la sola ŝtato hindo-ĉina, kiu konservis sian politikan sendependecon. Dume Birmo, la Ŝan-ŝtatoj, Laoso, Anamo, Kambodĝo kaj la malaja ŝtataro venis sub fremda estrado, Siamo restis libera kiel diras la enlanda nomo de la ŝtato « Muang Tai » t.e. « Lando de la liberuloj ». Tio aperas preskaŭ kiel miraklo, se oni prezentas al si, ke ĉirkaŭ Siamo estas la tributŝtatoj de la eŭropaj koloniaj potencoj; kiuj ne preterlasas okazon pligrandigi siajn teritoriojn je la kosto de aliaj.

Tamen Siamo devis cedi grandajn spacojn al Francujo, 1893, 1904 kaj 1907 kaj en 1909 al Britujo la tributdevajn malaĵ-ŝtatojn Kedah, Kelantan kaj Trengganu. La plena divido de Siamo inter siaj najbaroj estis demando de tempo kaj nur la ĵaluzo inter Francujo kaj Britujo garantiis la daŭrigon de la sendependa reĝlando.

Hodiaŭ la kondiĉoj entute ŝanĝiĝis. La situacio en la politike vekigantaj kolonioj Birmo kaj Indociĉio ne konsilis pligrandiĝo de la teritorio je kosto de Siamo sed ankaŭ ties konsolidiĝo firmigis sian ekstereŭropan rolon. En 1917 ĝi aliĝis sub pli malpli milda premo de la aliancanoj al la milito kaj sendis 1.500 volontulojn al Francujo. Per tio ĝi atingis rekonon kiel samranga aliancano kaj, kio estis tre grava, la forigon de la rajtoj de eksterteritorieco por la germanoj. La nuligo de la « malsamaj kontraktoj » kun la unua okcidenta potenco havis kiel sekvon la iom post ioman forigon de la klaŭzoj tuŝantaj la sendependecon de Siamo. En la jaro 1923 Usono memvole rezignis je la rajtoj de eksterteritorieco kaj al la aliaj regnoj restis nenio alia ol sekvi tiun ekzemplon. Depost 1927 ĉiuj kontraktoj konsentantaj al fremduloj favoran situacion en Siamo estas nuligitaj. La aliĝo al la Ligo de Nacioj, la subskribo de Kellogg-pakto kaj arbitracia kontrakto kun Francujo plie firmigis la politikan situacion.

Tiu ĉi supreniro de Siamo ne estus okazinta, sen la sistema apliko de eŭropaj metodoj en administrado, armeo kaj tekniko, komenciĝintaj sub reĝo Ĉulalongkorn (1868-1910). Siamo disponas hodiaŭ bone organizitan teran kaj aeran armeon. Multon oni dediĉis al la plibonigo de la fervoja reto; la ekspresvagonaro de Bangkok al Penang estas unu el la plej bonaj en tuta Azio. La konstruo de aŭtostratoj mankantaj ĝis nun, komencos.

Nature tiuj reformoj postulas multan monon. Siamo troviĝis en financaj malfacilaĵoj, speciale dum la regado de Ramas Vajiravudh kaj ĝi devis akcepti la kontrolon de eksterlanda financa konsilanto. Kun ĝi la deficiito de la ŝtata administrado malaperis depost la enoficiĝo de reĝo Prajadhipok (1925), ĉefe per ŝparoj kaj malgrandigo de la administra aparato. La reĝo mem cedis senteblian parton de siaj enspezoj. Kiom multe la registaro klopodas iri kun la tempo montras la sinsekva preparo de la tereno por enkonduki demokratiajn formojn. Siamo estis ĉiam absoluta monarkio, en kiu la volo de la supera estro estis leĝo por ĉiuj. Reĝo Prajadhipok nun kreis du korporaciojn, kiuj lin konsilas: La ŝtatan konsilantaron kaj la plenumkomisionon de la Sekreta konsilantaro. Samtempe estas starigataj sendependaj administraj korporacioj por urboj kaj kamparo.

Se vidiĝas el tio la deziro enkonduki la progreson de la okcidento laŭ la bezono de la popolo kaj en formo konvena al ĝi, restas tamen la firma volo, konservi la spiritan heredaĵon de la antaŭuloj.

En Siamo Budhismo estas ŝtata religio, kiu penetras la tutan vivon. La popola eduko plejparte estas en la manoj de monaĥoj. La siamano ĝenerale pasiis kelkan tempon en monakejo

kaj per tio oni povas juĝi pri la forta influo de Budhismo. La reĝo havas la titolon « Protektanto de l'budhisma kredo » kaj kiam antaŭ kelkaj jaroj li deklaris ke li uzos tiun titolon oficiale apud la aliaj en ĉiuj registaraj komunikadoj, estis tio grandega okazaĵo en la budhisma mondo. Kaj efektive tiu ĉi lerta movo influis senteble la politikon en la tuta malantaŭa Hindujo.

Propagandante la kredon, Budhistoj utiligas la plej modernajn rimedojn. Ekzemple la estro de la fama monakejo Debsirinda. Somdet Phra Budhaghosa parolas de tempo al tempo en la radiostacio. En la publika vivo Budhismo tre vidiĝas; ĉiujare dum Oktobro la reĝo en solena procesio vizitas la templojn de la ĉefurbo, meze de sorĉfabela lukso kaj brilo.

Apud la religiaj festoj la siamanoj festas ankaŭ aliajn, devnantajn el tempo kiam Hinduismo estis ankoraŭ disvastigita en Siamo. Vera festa febro kaptas la landon kiam estas trovata « blanka elefanto » kaj kondukata en solena manifestado al la reĝa kastelo. Tio laste okazis dum Novembro 1927. La elefanto ne estas blanka, nur pli hela ol la kutimaj.

La signifo de la blanka elefanto estas pli politika ol religia. En antikva tempo, kiam la regnestro mem kondukis la popolon al la batalo kaj ankoraŭ luktis persone kun la kontraŭula estro, la reĝa rajdis sur elefanto, kiu sin distingis per pli hela koloro de la aliaj. Venkita estro devis liveri sian elefanton al la venkinto.

La posedo de tre multaj blankaj elefantoj estas atributo de la reĝa digno. Pli frue ornamis blanka elefanto la ruĝan flagon de Siamo. Sed la nuna reĝo enkondukis flagon rug-blank-bluan, kvinfoje striitan. Tio ŝajnis al la reĝo pli konforma al la internacia uzado. Provoj rekonduki la malnovan originalan flagon restis sensukcesaj.

Siamo estas agrikultura lando. La rizplantaĵo estas la bazo de la tuta ekonomio popola. Se influas krizoj kaj malbonaj rikoltoj tiamtempe la ekonomion de la lando, la situacio de la kamparano tamen longe ne estas tiom tuŝata, kiom samokaze en aliaj landoj. La ekstreme fruktodona tero permesas al la facile kontentigebla siamano facile rikolti la necesan minimumon de l'ekzisto.

Pro tio la registaro en Siamo havas nenian zorgon pri revoluci propagando. Sed alia problemo tre okupas ĝin: La ĉinoj. La tuta komerco kaj la metiario preskaŭ entute estas en la manoj de la ĉinoj. La ĉina kaj la duonĉina loĝantaro de Siamo estas taksata je du milionoj da homoj, kio estas la kvinono de la tuta loĝantaro. En Bangkoko mem la ĉinoj formas 65 % de la loĝantaro.

Antaŭe la ĉina enmigraĵo ne prezentis danĝeron por Siamo. La ĉinoj kiuj enmigris ne estis akompanitaj de virinoj. Ili plejofte edziĝis kun siamaninoj. Se ili tiam revenis la patrolandon, ili kunprenis la infanojn aŭ tiuj restis kaj fariĝis siamanoj. La asimiligo de la ĉin-siama idaro per la siama loĝantaro je estas facila, ĉar ambaŭ popoloj estas ja parencaj laŭ raso. La antaŭuloj de la siamanoj ja enmigris el Suda Ĉinujo al Hindujo.

Sed la ĉina problemo venis en novan stadion. La ĉinoj venantaj nun estas akompanataj de edzinoj. Stariĝas ĉina kolonio meze de la siama loĝantaro. Ankaŭ ŝanĝis la sinteno. Pli frue indifera politike, multaj el ili aliĝis al la instruoj de la Kuomintang-partio aŭ eĉ al la radikalaj ideoj de l'komunismo. Kompreniĝas do ke la registaro atente observis tion. Sekvis severa kontrolo de la enmigraĵo kaj severaj leĝoj kontraŭ ĉiuj celadoj povantaj influi la pacon de l'lando.

Per tio oni sukcesis pli malpli eviti eniron de elementoj nedezirataj. Sed kio fariĝos el Siam se la ĉina loĝantaro daŭras kreski samgrade kaj sin konsideras kiel eksteran postenon de la refortiganta Ĉinujo, tion montris la estonteco.

(Trad. G. AGRICOLA.)

Socia Vivo

Sekureco kaj senarmigo

La dato de la tutmonda konferenco pri senarmigo fariĝas jam tute proksima. Niaj artikoloj pri tiu temo venigis al ni tre interesajn leterojn pri tiu temo el diversaj landoj.

Estas konstateble ke, laŭ la nacia gazetaro, kiu muldas opiniojn de la popoloj, oni povas dividi la nunan mondon en du grupoj laŭ tiu rilato. La granda plimulto konsideras la kreskon de armiloj kiel la plej gravan danĝeron al sekureco kaj ŝatus ian internacian arangon por kreskigi la sekurecon per ĉiufanka reduktado de l'armiloj.

La malplimulto, konsistanta el du aŭ tri landoj, inkluzive la mia, vidas male sian sekurecon en siaj armiloj kaj timas plian malsekurecon en okazo de reduktado.

Ĉar tiuj diferencoj estas afero de timo kaj sento, neniu trovas facila ilian senpasion ekzamenon. La plej logikaj rezonadoj ne helpas kontraŭ instinktaj tute sinceraj impresoj. Tamen tiu malkonsento estas tiel grava, ke ĝi povos malsukcesigi la konferencojn kaj okazigi nekalkuleblan katastrofon. Pri tiu danĝero ĉiuj konsentas.

Por kunigi ambaŭ opiniojn, estis proponite unue certigi ian sekurecon antaŭ la senarmigo por redoni la fidon al la timanta malplimulto kaj poste organizi la senarmigon kiel rezultaton de tiu certigita sekureco.

Sed ankaŭ en tiu rilato la sentoj ludas tre grandan rolon por taksati la sufiĉecon aŭ nesufiĉecon de la sekureco. Neniu neas, ke oni jam progresis iom sur tiu vojo. La ekzisto de la Ligo de Nacioj, kvankam ankoraŭ malforta, certe igas malpli facila deklaron de milito.

Kiam okazas ia insulto aŭ perfortajo, la ofendito sin turnas al Ĝenevo anstataŭ tuj mobilizi armeon kaj deklari teruran militon por defendi sian honoron aŭ teritorion.

Jam en kvar okazoj la Ligo sukcesis, ke ŝtato rezignu je defenda milito, kiu estus alie neevitebla. Tio ne okazis sen diplomataj ŝanceliĝoj, ofte naŭzigaj, sed tamen la buĉado estis evitata kaj la kaŭzo mem de l'afero estis sendita al arbitracia procedo.

Poste venis la subskribo de l'Pariza kontrakto (Briand - Kellog) por solena rezigno je militajto. Fine la ĝenerala akcepto de la deviga juĝo de disputoj interŝtataj per tribunalo.

Do certe la oficialaj kondiĉoj de sekureco kreskis deponde de la mondmilito kaj certaj baroj stariĝis kontraŭ « akcidentoj ». Sed ekonomiaj aŭ politikaj motivoj de milito daŭras ekzisti kaj iuj ŝtatoj opinias ke la novaj juraj baroj kontraŭ milito ne sufiĉas certigi absolutan sekurecon. Vidu Azion.

Ili volus plian garantion per organizita minaco de perforto kontraŭ eventuala perfortanto. Ekzemplo de tia garantio kuŝas en la kontrakto de Locarno, kiu devigus Angluojn milite subteni Francujon aŭ Germanujon se unu estus invadita de la alia. Per la fama « Ĝeneva Protokolo », kiu ne estis akceptata, oni provis starigi ĝeneralan sistemon laŭ tiu modelo. Cetere la kontrakto mem de la Ligo jam entenas similan promeson sed ne tiel precizan.

Organizo de tiu garantio per kolektiva militminaco ne sukcesis, ĉar nek Usono, nek Britujo volas riski militon pri aferoj malproksimaj, kie ili ne aprobas aŭ ne komprenas certajn landlimojn. Same nun Francujo pri Azio.

Eĉ en la malplimulta « partio de la sekureco », iuj landoj, kiel la mia, ne konsentas je tia ekstera militpromeso pro sia kutimo je neŭtraleco. Svislando eĉ eniris la Ligon kun escepta permeso konservi sian neŭtralecon militan, ne ekonomian, en ĉiu ajn okazo, kio estas, laŭ mia persona opinio, pozicio ne longe tenebla kaj morale diskutbla.

Do ŝajnas, ke oni ne facile trovos interkonsenton por kreskigi sekurecon laŭ la militminaca metodo kaj oni devos kredeble kontentiĝi je la juraj rimedoj kaj la kreskanta kutimo je arbitraco.

Kiel estos eble tiam venki la timon de la malplimulto ? Estos verŝajne tute neeble. Sed oni povos akceli senarmigon montrante al la timantoj la timon de la ceteraj kaj ĝian rezultaton.

Kiamaniere ?

Tiel ĉi : vi timas najbarojn kaj konstruas pliajn armilojn por esti sekura. Ĉu la afero finas per tio ? Tute ne. La najbaroj vidas viajn novajn armilojn kaj ektimas vin.

— Nu bone. Tiam ili ne atakos min.

— Pardonu, sed ili eltrovas novajn rimedojn kaj konstruas kvar armilegojn kontraŭ viaj du.

— Nu, mi tiam konstruos ok.

— Tiam ili sin malsatigos por havi dek ses kaj vi neniam finos. Vi ĉiam pensas nur pri via timo kaj neniam pri *ilia*. Same kiel iliaj militaj organizoj aŭ novaj armiloj kreas ĉe vi malfidon, tute same via deziro de milita supereco kaŭzas ĉe ili similan psikologian reagon, kiu kondukas ĝuste al kreskigo de *iliaj* armiloj kaj de *via* danĝero. Ne pensu pri unu, sed pri pluraj.

La fenomeno povas resumiĝi per komparo kun spegulo. Vi vidas en viaj armiloj sekurecon kaj la cetera vidas en ili danĝeron. Vi vidas en liaj armiloj danĝeron kaj li vidas en ili sekurecon.

Do la armiloj donas sekurecon aŭ danĝeron laŭ tio, ĉu oni rigardas ilin de interne aŭ ekstere. Se oni elektos la internan vidpunkton kaj konsideros armilojn kiel sekurecon, tiam ili senfine kreskos ĝis nia civilizo malaperos en buĉo. Se oni elektos la eksteran vidpunkton kaj konsideros ilin kiel danĝeron, tiam oni decidis ilin redukti (kaj tion severe kontroli ĉie) por sin fine savi.

El tiu dilemo, kiu povas eliri ? Ĉiu vidpunkto pri unu lando estas senvalora por solvi problemon, kiu apartenas al ĉiuj. Se la gazetaro tion akcentus anstataŭ rezoni en ĉiu ĉefurbo nur pri sia lando, tiam oni povus esperi ion en Februaro, sed la homoj uzas por si mem pli dikajn okulŝirmilojn ol por siaj ĉevaloj.

Ili pensas : « Kia malfeliĉo, se ni devos redukti niajn fortojn » anstataŭ : « Kia feliĉo se la najbaroj devos ankaŭ redukti siajn ! »

Edm. P.

La Poeto

*Mi vivas en alta soleco
Trankvila lageto sur monto.
Sed la plej impetan torenton
Sprucigas plej alta la fonto.*

*Min tage trairas rebrile
De blankaj nubetoj la veloj
Kaj nokte ludetas en mi
La fiŝetoj el oro : la steloj.*

*Sed al vi ne estas mi fremda,
No homoj en via turmento
La kanto el mia soleco
Saltegas — la monta torento.*

*Saltegas al vi nur ho homoj,
Ho valoj korriĉaj de l'tero,
La Kanto de monta pureco
La torento de ama kolero.*

Charles BAUDOIN.

Literaturo

La ŝafoj en maron

Komika rakonto de Rabelais. (1490-1553)

Vojaĝante sur ŝipo, Panurgo renkontis vendiston de ŝafoj. « Foriru iom, li diris al siaj kunuloj, tenu vin aparte kaj ĝoje pasigu la tempon el tio, kion vi tuj vidos. Estos bela ludo, se la ŝnuro ne rompiĝos. »

Tiam li turnis sin al la vendisto kaj drinkis al lia sano plenan botelon de bona, lanterna vino. La vendisto akceptis la inviton en sincera ĝentileco. Tiam Panurgo respektete petis lin pro Dio vendi al li unu el la ŝafoj.

Respondis la vendisto : « Ve, ve, amiko, najbaro mia, kiel lerte vi scias kapti malriĉajn homojn ! Vere vi estas ĝentila kliento. Jen brava kolektanto de ŝafoj ! Per Dio vi havas vizaĝon, ne de ŝafaĉetanto, sed de rabisto de monsakoĵ. Pro la Sinjoro, kunvojaĝanto mia, kiel taŭgas porti plenan monujon en via societo !... »

— Ne koleru, diris Panurgo, sed pro favoro speciala, vendu al mi unu el viaj ŝafoj. Kiom ?

— Kiel, respondis la vendisto, vi komprenus tion, amiko mia, najbaro mia ? Temas pri grandlanaj ŝafoj. Jason prenis el ili la faman oran felon. El ili venas la ordeno de l'Burgunda dinastio. Ŝafoj el Oriento, ŝafoj el alta kresko, ŝafoj el kvalito !

— Konsentite, diris Panurgo, sed pro favoro vendu al mi unu. Mi bezonas ĝin kaj pagos al vi tiuj per moneroj taŭgaj, bonspesaj, kaj ĝustaj. Kiom ?

— Amiko mia, najbaro mia, respondis la vendisto, aŭskultu iom el alia orelo.

— Laŭ via ordono.

— Vi vojaĝas al Lanternio ?

— Kial ne ? (respondis Panurgo).

— Por vidi la mondon ? (demandis la vendisto).

— Kial ne ?

— Ĝoje ?

— Kial ne ?

— Via nomo, laŭ mia supozo, estas Robinŝafo.

— Tiel plaĉas al vi konstati.

— Sen ofendo.

— Komprenoble.

— Vi estas, laŭ mia supozo, la ŝerculo de l'reĝo.

— Kial ne ?

— Jen la afero. Ha, ha ! Vi vojaĝas por vidi la mondon, vi estas la ŝerculo de l'reĝo, via nomo estas Robin Ŝafo. Nu rigardu tiun ŝafon ĉi apude. Lia nomo estas Robin ĝuste kiel vi. Robin. Robin. Robin. (Blekas la besto) beh, beh, beh. Ho kia bela voĉo !

— Tre bela kaj harmonia, diris Panurgo.

— Jen kontrakto inter vi kaj mi, najbaro kaj amiko mia. Vi, Robin Ŝafo, staros en ĉi tiu plado de la pesilo kaj la mia ŝafo Robin staros en la alia. Mi vetus centon da ostroj holandaj ke peze, valore kaj takse, ĝi venkos vin alte kaj sendiskute, tute same kiel vi mem estos iam alte kaj sendiskute pendigita.

— Ni vidos, diris Panurgo. Sed vi farus multon por mi kaj por viaj heredantoj, se vi volus al mi vendi ĝin, aŭ iun alian, eĉ ne tiel belvoĉan. Mi petas vin, Sinjora Moŝto.

— Amiko mia, respondis la vendisto, el la felo de tiuj ŝafoj oni fabrikos la famajn ŝtofojn el Rouen... El la haŭto estos fabrikataj la luksaj marokaĵoj vendotaj kiel ledoj turkaj aŭ Montelimaraj, aŭ hispanaj en plej malbona okazo. El la intestoj oni faros kordoĵn por harpoj kaj violonoj kaj vendos ilin kare kvazaŭ kordoĵn el Munĥeno... kion vi pensas ?

— Se plaĉas al vi, diris Panurgo, vi do vendos unu al mi kaj min igos forte danka. Vidu la monon pretan. (Tiam li montris sian monuĵon plenan je novaj « Henrikoj » arĝentaj.)

— Amiko mia, respondis la vendisto, najbaro mia, tia viando nur taŭgas por reĝoj kaj princoj. Tia karno estas tiom delikata, tiom bongusta, tiom manĝinda, ke ĝi egalas balzamon. Mi venigis ilin el lando, kie eĉ la porkidoj (Dio estu kun ni !) manĝas nur frandaĵojn. Tie la porkinojn (kun respekto al vi ĉiuj !) oni nutras per orangĥloroj.

— Nu, diris Panurgo, vendu al mi unu kaj mi pagos laŭ-reĝe, pro honor' de piulo. Kiom ?...

— Amiko, najbaro, respondis la vendisto, ne forgesu ton ĉi. Kie tiuj ŝafoj akvumis la kampojn, tie kreskas la tritiko mirinde kvazaŭ Dio mem estus akvuminta. Ne plu necesas alia sterko. El ilia urino la kleraj apotekistoj elĉerpas la plej bonan salpetron en tuta mondo. El ilia sterko, (se ne malplaĉas al vi) la medicinistoj de nia lando kuracas sepdek diversajn malsanojn. La plej malgrava el ili estas la malsano Sankt Eŭropo de Xaintes, de kiu Dio nin savu kaj gardu. Kion vi pensas, najbaro kaj amiko mia ? Tiuj ŝafoj kostas al mi.

— Kostas kaj valoras, respondis Panurgo. Nur vendu al mi unu, kiun mi bone pagos.

— Amiko mia, diris la vendisto, najbaro mia, konsideru iom la miraklojn de naturo en tiuj ĉi bestoj apude, eĉ pri korpoparto, kiun vi kredus senutila. Rigardu kornon. Pulverigu ĝin per fera premilo aŭ ligna trunketo, (al mi estas egale). Tiam enterigu tiom, kiom vi volas, sub suno, kaj donu akvon ofte. Post kelkaj monatoj vi vidos elkreski la plej bonajn asparagojn en la tuta mondo...

— Eble, diris Panurgo, sed ni rapidu,

— Nu, respondis la vendisto, kiam mi estos laŭdinta la internajn partojn, ŝultrojn, femurojn, bruston, hepaton, vezikon, per kiu oni ludas pilkon... la kapon per kiu, kun iom da sulfuro, vi faras mirindan medicinon por faciligi la hundojn kun ventro ŝtopita...

— Bone, bone, diris la ŝipestro al la vendisto, sed tro longe daŭras tiu marĉandado. Se vi volas, vendu al li; se vi ne volas ĉesu lin amuzi.

— Mi ja volas, respondis la vendisto, pro amo al vi, sed li pagos tri funtojn popece kun la rajto elekti.

— Estas multe, diris Panurgo. En mia lando mi ricevas kvin, eĉ bone ses, por tia sumego da moneroj. Atentu, ke ĝi ne estu tro. Vi ne estus la unua, kiu (laŭ mia sperto), volinte tro frue sukcesi kaj riĉiĝi, male falis en malriĉecon kaj eĉ foje rompis sian kolon.

— Febro vin forportu, peza malsaĝulo ! Per pia sanktulo, eĉ la plej malgranda el miaj ŝafoj valoras kvaroble pli ol la plej bona el tiuj, kiujn la Koraksianoj en Juditiano, hispana regiono, vendis oran sumegon popece.

— Pia sinjoro, diris Panurgo, vi varmiĝas kaj ekscitiĝas. Nu bone, jen prenu vian monon.

Paginte la vendiston, Panurgo elektis el la brutaro grandan ŝafon kaj forportis ĝin kriantan kaj blekantan, kion aŭdante ĉiuj ceteraj kunblekis kaj rigardis kien oni kondukas ilian kunulon.

Dume la vendisto diris al siaj ŝafistoj : « Ho, kiel bone li sciis elekti ! Estas lerta kliento, tiu malĉastulo ! Vere, eĉ

tute vere, mi rezervis tiun pecon por la Sinjoro el Kankal, bone konante la guston de lia Moŝto. Ĉar laŭ sia naturo, li sidas tiom ĝoje kaj plezure kiam li tenas en mano belaspektan kaj allogan ŝultron de ŝafaĵo kaj, per bone akriĝita tranĉilo, Dio scias kiel li skermas al ĝi ! »

Subite, mi ne scias kiel, (la afero okazis ne atendite kaj mi ne havis eĉ tempon konsideri) Panurgo sen plia diro, jetas en vastan maron sian ŝafon kriantan kaj blekantan. Ĉiuj ceteraj ŝafoj, kriantaĵ kaj blekantaĵ en sama tono, ekjetis sin kaj saltis en maron post ĝi, une post alia, vice. La brutamaso sin puŝis batalapte, por salti, ĉiu plej unue post sia kunulo.

Estis neeble ilin haltigi. Vi ja scias ke ĝuste tio estas la naturo de l'ŝafo ĉiam sekvi la antaŭulon ien ajn. Kiel diras Aristotelo, *lib. IX. de Histor. anim.*, ĝi estas la plej malsaĝa kaj senpensa besto de l'mondo.

La vendisto, kun teruro vidante siajn ŝafojn morti kaj droni sub siaj okuloj, klopodis ilin haltigi kaj reteni per tuta forto. Sed vane. Ĉiuj vice saltis en la maron kaj pereis. Fine li kaptis unu grandan kaj fortan per ĝia lano sur la ferdeko de l'ŝipo, esperante lin malebligi tiel kaj savi la restantajn.

La ŝafo sin montris tiom potenca ke ĝi forportis kun si la vendiston kaj dronis ambaŭ en simila maniero kiel la ŝafoj de Polifemo, la blindigita ciklopo, forportis el la groto Odiseon kaj liajn kunulojn. Simile faris la ceteraj paŝtistoj kaj ŝafistoj penantaĵ kapti la bestojn, je korno, je kruro aŭ je la lano. Sed ĉiuj estis same en maron portitaj kaj dronigitaj kompatinde.

Trad. Edm. PRIVAT.

Nokto

De Mihail Eminescu.

*Nokto. Milde kaj ruĝblue en la forn' la fajro brulas,
El angul' ĝin rigardante sur ĥanap' min sternas mi,
La animo endormiĝas, la pa-pebrojn fermas mi,
Estingiĝis lum' en domo, sorĉa song' min mole lulas.*

*Nun vi tra l' mallumo venas, alridetas min proksime,
Blanka, kvazaŭ neĝa vintro, do.ĉa, kvazaŭ printemp-tag'.
Sidu en la sino, ĥara, ĉirĥaŭringu min per brak,
Kaj rigardu miajn palajn vangojn ame kaj intime.*

*Per balzamaĵ, blankaj braĥoj, rondaj braĥoj, vi min ĥo'le
Ĉenas, kaj sur mia brusto via ĥapo ĥuŝas nun,
Poste vi la blankan manon levas, kaj ĝi tuŝas nun
Songe mian tristan frunton, harojn forĥaresas mole.*

*Mian frunton en tranĥvilon lulas la ĥareso flata,
Min ĥredante dorma, ruzo, ĥisas vi per arda tuŝ
Min sur la oĥkuloj fermaĵ, sur la frunto, sur la buŝ,
Kaj vi ridas, ĥiel songo ridas en anim' ravata.*

*Ho, ĥaresu dum la frunto estas glata kaj serena,
Ho, ĥaresu, dum vi junas, kvazaŭ suno de aŭror'
Dum vi puras, kvazaŭ roso, dum vi dolĉas, kvazaŭ flor',
Dum ĉi frunt' ne estas falta, kaj ĉi ĥor' ne maljun-svena.*

El rumana: K. Kalocsay.



Internacia Polica Ligo

Oficiala Informilo

Kurso por kriminalistoj kaj policistoj I
Raporto de AJO.

La fervora polic-asistanto Kleberg sukcesis aranĝi Esperanto-kurson inter la policistaro de Kolding, kiun laŭ Ĉe-metodo gvidis la sudgermana instruisto AJO en kvar semajnoj, de Aŭgusto kaj Septembro. Interalie partoprenis tri kriminalistoj, la polic-asistanto kaj du inspekciaj policanoj. Kvankam malfavoraj deĵortempoj regulan vizitadon ĝenis, la kursanoj regule venis al la konversacioj. Iom por la polica servo almezurita ĝi okazis ĉiun posttagmezon dum du horoj. La urba administracio afable disponigis ĉambrom en la juĝejo, la atestantejon al skabena tribunalo, kiu kun sia surmura bildo digne impresis.



Dekomence oni serĉis rilatojn al la Internacia Polica Ligo, kies direktoro tuj respondis, transsendinte taŭgan materialon. Mult-nombre estas jam dissenditaj la unuaj korespondaj kartoj al fak-fratoj diversnaciaj. La kriminalisto V. Kallan, partopreninta la kurson kun sia filino, aperigis longan artikolon en la danaj fak-jurnaloj por kriminalo kaj polico.

La grup-bildo montras antaŭ la pordego al juĝejo la partoprenintojn en la AJO-kurso kun la policestro Thalbitzer kaj urba kasestro P. Zoffmann Delegito de UEA, kiuj kun supera policisto Fasting estis invitatataj al la infesto. Ekestis bona humoro kaj kelkiuj peniĝis fari la unuajn paroladojn esperante. Nia pioniro en la dana espmovado, samideano P. Zoffmann, rakontis inter alie amuze pri siaj travivaĵoj dum bicikla kongresvojaĝo al Parizo en 1914. Eksplodis la mondmilito, pro kio la kongreso ne povis okazi. Sur malrektaj vere aventuraj vojoj fine li atingis sian hejmlandon — sen biciklo. Decidiĝis la fondo de policista esperanto-grupo en Kolding, kiu kolektive aliĝas al UEA kaj kompreneble ankaŭ de I.F.L. Gvidate de la vigla V. Kallan la policanoj, 15 entute, kunvenos ĉiusemajne por finstudadi la lingvon. Samideano Zoffmann volonte promesis sian helpon. Al la ĉefo de dana polico en Kopenhago estas detale raportita pri la tuta afero, kaj alligas sin ĉies deziro, ke tiu ĉi unua porpolicista kurso ĉi-lande estu elpaŝo al pluj sukcesoj de nia esperanta ideo inter la dana policistaro. « Ni semos kaj semos konstante ! »

Ni tutkore salutas kaj dankas al niaj novaj anoj en Kolding, kiuj donas al ni novan imitindan ekzemplon por disvastigi nian helpingvon inter la tutmonda policanaro. Vivu la grupo Kolding ! vivu la nova grupo en Riesa ! pri kiu informas la sekvantaj linioj.

A. POHLE, Liga redaktoro.

Tre estimataj samideanoj,

En Saksujo, en la urbo Riesa a. E. fondiĝis la 10-9-1931 la plej juna branĉo de l'Polica-Esperantomovado, sed la komenco estas malfacila. Pro tio, nia rondo petas la tutmondajn gekolegitojn akceli la tendencojn de nia rondo per helpo kaj subteno laŭ povo.

Dezirataj estas: novaj kaj malnovaj gazetoj, libroj, broŝuroj, prospektaj kaj alia materialo, taŭga por faktego, instruado kaj propagando, por ke nia helpingvo progresu kaj antaŭen iru.

Direktu viajn multtekstajn sendaĵojn al la sekretario de nia rondo, S-ro Herbert Pieschner, Riesa an der Elbe, Gendarmerieabteilung.

Polica-Esperanto-Societo-Riesa. J. A. PIESCHNER, sekretario.

Dankon al la svedaj fratoj

Mi rerulas mian memorfildon... Jen norda bildserio : ruĝaj dometoj sur blanka neĝgrundo.

La 29-an de Septembro 1928 alvenis mia ŝipo al Stokholmo. Sur la kajo atendis kun esp. flageto afabla S-ro Halldor. Baldaŭ mi rekontis rektoron Jansson kun staturato alta, kiel la turo de l'stokholma urbdomo, kaj okuloj mildebluaj, kiel la helĉiela fono de la hela sveda flago...

Komenciĝis la laboro. En la pentrinda Dalekarlio, en *Ludvika*, kie la elektra uzinanoj de AESA vigle partoprenis la unuan kurson. La dua akto en *Sunvalo* (Sundsvall).

Gävle, kie pastro Ĉe jam forrikoltis ĉiur. laŭron. Tamen ekfloris kursoj en najbaraj Strömsbro-Sandviken-Bomhus.

Nun *Örebro*... Historia urbo, kie iam ĉiuj ländvojoj renkontiĝis. Kaj kie nun renkontiĝis eĉ vivvojoj de svedino kaj rumano. Por ĉiama kuno laŭ verdstela radiaro...

Paralela kurso en najbara Hallsberg.

Stokholmo. La unuaj ŝtatkursoj. Artikoloj tra la ĉefurba gazetaro pri la ekzameno.

Helsingborgo. Eldiroj de Pedagogoj. Dum ekzamena festeno jen praktika surprizego de kvarcent skaniaj kursanoj. (Dank' al tiu valorega memoraĵo mi nun povas maŝinskribi mian dankraporton). Uddevalla. Multaj instruistoj partoprenas la kurson, bonegaj lernantoj.

Ora bruo (*Örebro*) revokas... Favoropinia inspektoro.

Somerumo en la *Gränsnäs*-a verda paradizeto. En la Pluv- kaj Ventbanejo (t.e. Sun- & Aerbanejo de Excelsior).

Komenco de la tria laborjaro : *Norrköping-Linköping*. Lernejspektoro entuziasmiĝas por Esperanto. Poste tre streĉa, sed eble ne senrezulta kursado samtempe en 4 urboj : *Enköping-Heby-Uppsala-Västerås*.

Fine la lasta kursoserio en Vermlando :

Kil, Skoghäll, Säffle; kursoj en la kino kaj... preĝejo, ĉar nur tie sufiĉe grandaj kursejoj.

Pentekosta kongreso (mi vere ne revenis pente pro la kosto). Fine la 28-a de Junio 1931, sankciinta korjuron : bati laŭ Dia volo, Zamenhofa testamento.

Parolado en *Mösseberg* (antaŭ kvarmil aŭskultantoj dum somerfesteno, kiun ĉeestis ankaŭ la estro de la Sveda Ruĝa Kruco, princo Karlo), tujposte jam la sesan tagon post la geedziĝo kursado en *Gränsnäs*, vojaĝo al Kraka Ovo, nigra semajno oficialula... Poste al la hejmlando rumana por revidi la familion forlasitan antaŭ 3 jaroj. Fine vojaĝo al nova laborkampo ĉe gastamaj — malgraŭ ekonomia mizero — saksoj. Kaj kursoj en sep lokoj kun. 500 anoj. Jen aro da kaŭzoj, ke mia edzineteto kaj mi nur nun povas danki al la svedaj kaj alilandaj samideanoj pro ĉiu amikaĵo okaze de nia geedziĝo.

Nun tutkoran dankon al vi, patreca Rektoro Jansson, respektoplenan dankon, patriarko de la sveda movado : S-ro Prezidanto Nylén, dankegon S-roj Halldor, Encksson, dankon S-ro Malmgren.

Dankon al vi, ĉefdelegito Larsson, kaj koran dankon al vi, karaj Delegitoj en la Sveda Teritorio, kun kiuj kunlabori estis por mi speciala plezuro.

Dank' al la miraklaj mejlobotoj : Esperanto kaj Ĉe-metodo, mi sukcesis ekkoni, ami kaj respekti Svedlandon, la teron de Linnée, Andrée, Strindberg kaj Selma Lagerlöf...

Dank' al Zamenhof kaj pastro Ĉe, pere de la bravaj saksaj samideanoj, estas nun mia edzino kaj mi feliĉaj gepatroj de kvarcent kursinfanoj egaj kaj etaj, en Saksujo.

Ĝis la revido, Svedaj Gefratoj, eble printempe.

TIBERIO MORARIU.

23a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

KRAKÓW 1931

2a LABORKUNSIDO

la 5 Aŭgusto 1931 en la Festsalono de la Katolika Domo

Komenciĝo : 9,30 h. Prezidas : sro. J. Merchant, prez. de I.C.K.

Sro. J. Merchant malfermas la kunsidon kaj esprimas la bedaŭron, ke la unua paroladanto sro. Georges Avril-Nico, prezidanto de la Internacia Gazetara Komisiono (komisiita de I.C.K.) ne ĉeestas. Sro. J. Šapiro-Bialistoko, membro de la sama komisiono anstataŭas lin kaj paroladas pri la gazetara propagando.

Parolado de sro. J. Šapiro-Bialistoko

pri « Gazetara propagando, ĝia utilo kaj organizo ».

Sro. Šapiro mallonge klarigas la gravecon de la gazetaro por nia propagando. Por kapti la grandan amason, necesas daŭre disvastigi novaĵojn pri Esperanto tra la gazetaro. Nur tiel la publiko estas konstante informita, scias pri la ekzisto de nia lingvo kaj de nia movado kaj iom post iom ekinteresiĝas aktive pri ĝi. Tre gravaj estas personaj rilatoj al la gazetaro. Ni devas klopodi havi tiajn rilatojn, kiuj ofte estas facile starigeblaj. Neniu esperanto-demonstracio okazu sen invito al la ĵurnalistoj ĉeesti. Grava estas la elekto de novaĵoj pri Esperanto. Por simplaj informoj pri la esperanto-vivo necesas informo por la koncerna rubriko de la gazetoj, kiuj ĉiutage informas pri societa vivo. La informoj pri Esperanto, aperontaj inter la aktualaĵoj devas esti zorge elektataj kaj redaktataj. Alie ili iras al la paperkorbo. En div. landoj jam funkcias bona gazetara servo. Ni ankaŭ devas atenti pri la loka organizo, kiu agadas kiel agenteo de la landa gazetara servo. La Intern. Gazetara Komisiono konstante okupas sin pri plibonigo de la organizo de gazetara propagando. Sro. Šapiro alvokas varme al subteno de ĉi tiu laboro de ĉiuj samideanoj, kiuj iel povos helpi al progreso.

Sro. Ziomek ne konsentas pri ĉio, kion diris sro. Šapiro. La ĵurnalistoj, li diras, atentigas ofte pli pri la titolo ol pri la enhavo. Ni devas propagandi ne pri Esperanto, sed per Esperanto. Esperanto ne bezonas esti menciata en la titolo.

Sro. Kreuz atentigas pri la neceseco adapti la sendatan artikolon iaforme al la tendenco de la koncerna gazeto. Ebleco pri tio ĉiam ekzistas kaj ofte estas la sola rimedo por akceptigi novaĵojn.

Sro. Prof. Mihalik-Budapeŝto nur ĵus alveninta al la kongreso pro malsano, salutas en la nomo de l'hungara registaro, de Hungarlanda Esp. Societo kaj informas pri la intereso koncerne Esperanton en oficialaj rondoĵoj de la lando.

Sekvas nun

Parolado de sro. ĉefred. Teo Jung-Kolonjo

pri « Centriĝo de la gazetara informado pri Esp. ».

La gazetara informado pri Esperanto estas duspeca, diras sro. Jung : La informado al la esperantistoj, la informado al la ne-esperantista publiko. Ambaŭ ofte reciproke servas kiel bazo.

Informado devas esti rapida. Estas senutile raporti pri malnova afero, disvastigita jam dum jaroj. Oni devas kapti la ĝustan momenton, precipe se la novaĵo estas en rilato al la ĉiutagaj okazantaĵoj. Informado devas esti fidinda. La honoro de nia afero malpermesas, ke ni mensogu pri ĝi. Ni evitu misprezenton kaj blufon, kiujn la publiko ja tamen rimarkas. Precipe pri ciferoj oni estu singardema. Informado devas esti kompleta. Gravaj precipe datoj, nombroj kaj nomoj. Oni ne citu bagatelaĵojn. Informado do devas esti konciza, ĉar la gazetaro hodiaŭ ne plu disponas pri tiom da loko pro abundeco de materialo. « Heroldo de Esperanto », antaŭe « Esperanto Triumfonta » klopodis servi kiel centro de informado pri Esperanto. Ĝi plenumis tion ĝis certa grado, sed multo restas ankoraŭ farota. Rolon ludas la ofteco de organo. La semajna apero tre utilis al plenumo de la tasko, sed eventuale apero devus okazi ankoraŭ pli ofte. Por atingi kompletecon oni starigis antaŭ 5-6 jaroj Internacian inform-servon. Sro. Jung intencas repreni la organizon. Sed estas ankoraŭ necesa pli intima kunlaborado al la redakcio, due oni devas havi konstantajn informantojn, trie oni devas pli severe redakti la manuskriptojn.

Rilate la unuan punkton bona efiko montriĝis el ofta kaj valora rilatado kun ICK, kiu ankaŭ estos esperiga por la estonto. La disvolvo de la aliaj punktoj dependos de kresko de la organo mem.

Estas bone, ke ICK starigis apartan komisionon, kiu de nun okupos sin pri la solvo de l'diversaj problemoj en tiu ĉi kampo.

Sro. Merchant dankas al sro. Jung pro la interesa parolado.

Sro. Agourline-Paris, membro de la Intern. Gazetara Komisiono subtenas la opinion de sro. Jung. Li petas pri pli rapida havigo kaj aperigo de novaĵoj. Ekzemple novaĵo pri la rezolucio de francaj komercaj ĉambroj aperis treege malfrue.

Sro. Kreuz respondas, ke oni klopodas pri tio, sed ke ofte ICK mem ĉerpas la novaĵojn nur el la gazetaro.

Sro. Schoofs rekomendas sendi tiajn novaĵojn tuj al ICK, kiu zorgos pri diskonigo.

Sro. Merchant konigas kelkajn spertojn el la gazetara propagando en Anglujo. La temo estas elĉerpita. Okazas poste.

Parolado de sro. Joh. Karsch-Dresdeno pri

« Vojoj kaj metodoj de apliko de Esperanto por turisma reklamo. »

La apliko de Esperanto por turisma reklamo jam ne plu estas novaĵo. Tuj post la fondo de UEA en 1908 aperis la unuaj gvidfolioj en Esperanto. La unua vera turisma reklamo per Esperanto grandskala estis verŝajne farita en Praha en 1912. Post la milito oni reprenis la ideon. Aperis pluaj gvidfolioj de UEA, aranĝitaj sammaniere, samformate ktp. Poste aperis granda nombro da similaj eldonaĵoj. Ne ĉiam estis eble atingi adapton al la normo. Aliaj estis faritaj sen konsidero al la jam faritaj eldonaĵoj. En 1926 UEA kreis la turisman servon, funkciantan en Germanujo kaj Francujo, kiu sisteme klopodis en tiu ĉi kampo. Por atingi sukceson tre preciza detal-laboro estas necesa. Oni

devas koni la bezonon, inviti la instituciojn, fari al ili proponojn, konsili ilin, eventuale mem prilabori ion laŭ alia modelo, havigi la kostojn, povas proponi presadon por aldono al organo, sugesti distribuon. Por ĉio ĉi necesas trovi okazojn, ekscii pri jam ekzistantaj presajoj ktp. ktp. Preparo devas okazi tre serioze kaj bonforme, ĉar alie mankos sukceso. Tre utila estas kombino kun vojaĝoj aŭ libertempa restado. Turismaj institucioj tiam interesigas pli facile. Sro. Karsch atentigas pri tiaspeca provo en Lazne Bělohrad (Ĉeĥoslovakio atentigas pri tiaspeca provo en Lahn Bělohrad (Ĉeĥoslovakio), kie sin anoncis 35 personoj por pasi la libertempon.

Li tre rekomendas turnu sian atenton al tiu ĉi kampo kaj kunlabori en tiu ĉi klopodo, kiu havas grandan signifon por la enkonduko de Esperanto.

En la posta diskuto partoprenas sro. Morariu, sro. Karsch, sro. Schoofs kaj Dro. Pillik, plue sro. Brauer-Tallinn, kiu atentigas pri la fondo de Esperantista Turisma Komisiono.

Sro. Karsch ankoraŭ aldonas, ke tiaj reklamiloj ne bezonas esti presataj pere de UEA kaj ankaŭ sro. Šapiro akcentas, ke presado kompreneble povas okazi en la koncerna lando. UEA nur klopodas akceli kaj laŭpove unuformigi ĉion.

Post la 3 paroladoj, kiuj trovis seriozan atenton, sekvas kortuŝa momento. Laŭ invito. F-ino Lidja Zamenhof aŭdigas per gramofono la voĉon de nia majstro Dro. Zamenhof. La disko estas reproduktita laŭ malnova fonografa cilindro, kiun posedis sro. Alfonso Sabadell-Barcelono kaj kiun li gardis kiel relikvon. La reproduktaĵo, kiu renkontis grandajn teknikajn malfacilaĵojn, efektiviĝis post interveno de ICK kaj dank' al modela klopodo de la Kataluna Esp. Federacio kaj unuavice de ĝia eksprezidanto sro. J. Gili-Norta. La disaŭdigo kaŭzis multan emocion, spite al tio, ke la reprodukto estas sufiĉe mankhava.

Sro. Schoofs proponas dankesprimon de la Kongreso al sro. A. Sabadell kaj al la Kataluna Federacio pro konservigo de tiu ĉi relikvo.

La propono estas akceptata per spontanea aplaŭdo.

Sro. Gelfand-Varsovio duan fojon komencas paroli pri projekto de son-filmo en Esperanto, fondo de kooperativo por tio kaj la kondiĉoj plenumataj. Pro tio, ke la oratoro ne povas adaptiĝi al la parol-daŭro, la temo estas remetata al la proksima kunsido.

Sro. Merchant fermas la kunsidon kun danko al ĉiuj.

Fino : 11,55 h.

3a LABORKUNSIDO

la 7 Aŭgusto 1931 en la Festsalono de la Katolika Domo.

Komenciĝo : 9,30 h. Prezidas : sro. Merchant, prez. de I.C.K.

Sro. Merchant malfermas la kunsidon je preciza horo kaj sciigas, ke estas enŝovata en la tagordon :

Parolado de sro. Karl Brauer-Tallinn pri

« Racia uzado de Esperanto-ŝlosiloj ».

Sro. Brauer rekomendas esperantlingvan korespondadon de esperantistoj kun ne-esperantistoj per helpo de « Esperanto-ŝlosiloj ». Esperanto mem estas kvazaŭ antaŭdestinata por tia korespondado pro sia facileco kaj ĉiuj aliaj kvalitoj. Montrante al la publiko tiujn ĉi kvalitojn ni lasas propagandi la lingvon mem. La proponita korespondado unue devas pritrakti pure aferajn temojn kaj poste povos etendiĝi je rekta propagando por Esperanto. Sro. Brauer proponas

korespondadon kun eksterlandanoj kaj alilingvanoj kaj tian kun samlingvanoj ne-esperantistoj. Por la lastaj oni ne uzu Esperanton kiel nuran korespond-lingvon, sed uzu nur ekzemplojn por altiri intereson. Li proponas organizi tiun ĉi korespondadon laŭlande pere de la naciaj societoj kaj diskonigas bone pripensitan planon por tio.

Raporto pri la Lingva Komitato kaj la Akademio.

Sro. Merchant sciigas, ke sro. J. M. Warden-Edinburgo estas elektita kiel nova prezidanto de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio (Aplaŭdo).

Sro. Warden-Einburgo dankas pro la honoriga aplaŭdo kaj diras, ke li klopodos sekvi fidele la vojon, kiun iris lia antaŭulo, nia neforgesebla Prof. Th. Cart.

Post mallonga klarigo de la agado de la Lingva Komitato kaj la Esperantista Akademio, laŭ presita raporto, ankoraŭ verkita de Prof. Th. Cart li donas kelkajn konsilojn pri la elparolado de Esperanto. Li aldonas, ke laŭ li nur la komencantoj bezonas tian konsilon kaj gvidon. Klasika restas ĉiam la elparolo laŭ konsilo de Dro. Zamenhof mem pri mezlonga kaj mezlarĝa prononcado de l'vokaloj. Li kredas, ke poloj plej bone elparolas la vokalojn en Esperanto. Li atentigas pri broŝuro de sro. Krysta en Ĉesk. Tesin pri tiu ĉi temo, kiu aperis antaŭ ne longe. Kvankam li ne plene konsentas pri la enhavo, tre li rekomendas la enhavon al studado.

Sro. Schoofs aldonas, ke la ĉefa afero estas la metado de la akcentoj, nome de l'tonika akcento kaj de l'apuda akcento.

Sro. Robertson-Londono diras, ke oni devas sisteme ekzerci por eviti erarojn.

Sro. Enthouen-Hago parolas pri la malfacilaĵoj de elparolo de r kaj l, precipe por ĥinoj kaj japanoj.

Sro. Gelfand-Varsovio triafoje parolas pri sia projekto koncerne son-filmon por kiu estas donitaj al li apartaj 10 minutoj en ĉi tiu kunsido. Li denove parolas malkoncize, tro detale kaj malklare kaj per la enkonduko transpasas la paroltempon. La kunsido plendas per alvokoj kaj malakceptas aŭskulti pli longatempem.

La prezidanto post denova admono pri koncizeco daŭrigas la programon laŭ la presita tagordo.

Parolado de sro. Kreuz, Direktoro de I.C.K.

pri « Kiel propagandi pli efike — Ĉu Esperanto progresas ? »

Kiam oni komparas la staton de la Esperanto-movado nuntempa kun tiu de la antaŭmilita tempo, oni tuj konstatas la diferencon. Montriĝas, ke la progreso estas grandega, ja superas en kelka rilate tion, kion oni atendis. Pli frue esperantistoj propagandis ĉefe de persono al persono. Tiu ĉi metodo ankoraŭ hodiaŭ estas la plej bona. Propagando ne estu teda, sed interesa. Oni ne propagandu en rondoj, kiuj ne bezonas Esperanton, ĉar ankaŭ tiaj ekzistas. Necese estas, ke oni spirite enpenetrigu la ideon de lingvo internacia ĉe personoj, kiujn oni deziras varbi por Esperanto, ekz. ĉe kolegoj, lernantoj, amikoj, edzinoj ktp., al kiuj oni regule montras aferojn pri Esperanto aŭ al kiuj oni netede parolas pri tio de tempo al tempo. Plej bona metodo estas per-esperanta servado. Por propagando en oficialaj rondoj (peticioj a.s.) la bazo devas esti serioze esplorata. Proponoj devas moviĝi en la ideoj de la rondoj petataj. Oni devas labori racie kaj trovi la ĝustan vojon. Ni ne agu en kiu ajn kampo sen sufiĉa preparo kaj profunda studo de la detaloj. Ne la kvanto de laboro, sed la kvalito decidas por la sukceso.

La demando « Ĉu Esperanto progresas » estas ne nur farata de interesitoj, sed precipe de esperantistoj. Por juĝi la situacion, oni devas demandi malnovajn samideanojn. Oni komparu la staton de 1902-1903 aŭ eĉ tiun de 1909. En tiu tempo esperanto estis konsiderita ludobjekto de utopistoj. Hodiaŭ la publiko rekonas Esperanton. Centoj, ja miloj laboras senĉese por la progreso de Esperanto, kiu jam fariĝis grava faktoro en la internacia vivo. Komparu la kreskon de la praktika literaturo en nia lingvo. Ĉiuj simptomoj montras antaŭeniron, eĉ se nur parto de ĉiuj klopodoj sukcesas. La konkludo estas, ke Esperanto vere progresas. Kaj ĝi progresos pli kaj pli, se ni mem havas tiun ĉi konvinkon en ĉiuj niaj laboroj.

Sro. Merchant parolas pri spertoj en la propagando en rotari-rondoj kaj pri tiaj en la gazetara kampo. Speco de praktika propagando estos artikoloj pri Krakovo aŭ Polujo en la gazetaro, kiuj certe estos akceptaj, sed kiuj permesas, ke oni citu Esperanton en ili.

Sro. Münz-Berlin pedas por tio, ke oni lasu al kiu ajn propagandi en kiu ajn rondo. Ĉefafero estas, ke ICK subtenu la laboron. Oni ne malhelpu la laboron de novuloj.

Sro. Kreuz respondas al tio, ke kompreneble estas dezirinde, ke oni laboru en kiom eble plej multaj rondoj, sed ne en kiu ajn sen preparo. Novulojn oni devas observi, ĉu ili laboras taŭge aŭ ne kaj plej bona mezurilo estas la rezultato. Ne estas eble, ke ICK subtenu ĉion. Tiuj, kiuj bezonas helpon, devas sin turni al ĝi.

Por la lasta punkto de la tagordo mankas la oratoro, kiu pro fermo de la landlimo en Germanujo ne povis vojaĝi al la kongreso. *Sro. Schoofs-Antwerpeno* legas la manuskripton de

Parolado de sro. Dro. Hōke-Wuppertal-Elberfeld
pri Stenografio kaj Esperanto.

La historio de la skribo estas la historio de ĝia simpligo. Per la ĝisnunaj long-skriboj oni povas skribi nur malrapide kompare al la rapideco por paroladoj. La unuajn stenografi-sistemojn oni kreis por kapti paroladojn. Poste oni kreis aliajn ankaŭ por uzo en la ceteraj skriblaboroj, kiel montras la ĝenerala enkonduko en oficejoj. Ankaŭ dum ĉi tiu epoko stenografio estis konsiderata kiel kompletiga helpilo al la ĝisnuna skribo ordinara. De kelkaj jardekoj kreskis movado, kiu propagandas la uzon de stenografio ankaŭ por la ordinarnaj interrilatoj anstataŭ la ĝisnuna ordinara skribo. La ordinara skribo estos uzata nur por dokumenta skribo aŭ eventuale ankoraŭ kiel lego-skribo preslitera. Plej div. sistemoj estis kreitaj por plenumi tiun ĉi celon. La aŭtoro poste elmontras rezultaton rimarkindan pri eksperimento farita je lia 5-jara knabo kun la sistemo « Internacjonal-stenografio » de Kunovski. Li citas la div. avantaĝojn de la enkonduko de stenografio kiel ĉefskribon. kaj starigas program-tezon pri tio por la lernejo. Pri la demando, ĉu Esperanto devas havi propran stenografi-sistemon, li respondas nee. La esperantistoj devas klopodi pri kreo de internacia stenografio, uzebla por ĉiuj lingvoj kaj por Esperanto.

Diskuto pri la fak-parolado ne okazas pro foresto de la oratoro kaj manko de tempo.

Sro. Merchant kun danko al la ĉeestantoj fermas la kunsidon.

Fino : 12,15 h.

FERMA KUNSIDO

la 8 Aŭgusto 1931 en la Festsalono de la Katolika Domo
Komenciĝo : 10,15 h. Prezidas sro. J. Merchant, prez. de I.C.K.

Kompare al antaŭaj kongresoj la salono estas plen-plena. Multaj samideanoj estas vojaĝ-pretaj. Sufiĉa nombro estas preparita pro forveturi tuj post la tagmezo al Varsovio.

Rezolucioj

Apertago de Esperanto

Sro. Merchant donas la parolon al *sro. T. Indra-Riga* por prezento de rezolucio pri la aper-tago de Esperanto. La rezolucio tekstas :

La kongreso proponas fiksi la 2 junio, ĉiujare, kiel daton de la apero de Esperanto kaj eluzi ĝin ĉiujare por plej vasta propagando por nia lingvo.

Sro. Kreuz aldonas klarige, ke la Ĝenerala Estraro jam okupis sin pri la rezolucio kaj rekomendas ĝin al aprobo. La dato estas la tago, je kiu la rusa cenzuristo donis permeson pri publikigo de la unua libro de Esperanto. Alia aperdato ne estas facile konstatebla. La fikso okazis interkonsente kun la familio Zamenhof.

La rezolucio estas adoptata per aklamado.

Dankesprimoj

Sro. Prof. Dro. Canuto-Torino submetas la sekvantan rezolucion :

La kongreso esprimas sian koregan dankon al la ŝtataj aŭtoritatoj de Polujo, al la urbaj institucioj de Krakovo kaj al la gazetaro de la lando, kiuj bonvolis tiom efike subteni la laboron de la kongreso kaj per tio certigi ĝian sukceson. Ĝi ankaŭ esprimas sian rekonemon al la afabla kaj gastama loĝantaro de Krakovo pro la simpatia akcepto.

Akceptita kun aklamado.

Sro. Kreuz konigas la sekvantan tekston :

La kongreso esprimas sian dankon kaj plenan rekonon al la administracioj de la belga, ĉeĥoslovaka kaj franca fervojaro, kiu favoris la kongresanojn per aparta bileta rabato, plue al la direkcio de l'kompanio de marveturado de Belgujo, kiu faris same.

Akceptita kun aplaŭdo.

Sro. Kreuz sciigas el karto ĵus ricevita, ke la urbestro de Amiens (Francujo) baptis novan straton : Strato Zamenhof. (Aplaŭdo).

Solena transdono de honormedaloj de la I.C.K.

Sro. Merchant levigas por memori la meritojn de ĉiuj samideanoj tra la vasta mondo, kiuj senĉese, ĉiutage, laboras kaj batalas por la nobla ideo de Esperanto. Li informas, ke en la nuna jaro de ICK decidis donaci la honor-medalon de la ICK al sro. Prof. P. Christaller-Stuttgart (Germanujo) kaj al la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig, kies direktoro sro. Prof. Dro. Dietterle modeste malakceptis ĝin ricevi mem. Plua medalo estas transdonata al la familio Zamenhof. (Granda aplaŭdo).

Sro. Feliks Zamenhof tre kortuŝite kapablas esprimi nur kelkajn vortojn de danko en la nomo de la tuta familio.

Sro. Merchant nun esprimas la koran dankon de ICK kaj de l'tuta kongreso al al LKK kaj tute speciale al Prof.

Dro. Bujwid, kiel plej modela laboranto por ĉio, al la div. membroj de la komitato kaj ĉiuj, kiuj eĉ estas nenomitaj. Vivu la LKK, vivu Krakovo !

Sro. Karsch, vicprezidanto de UEA esprimas sian dankon en la nomo de UEA kaj informas, ke UEA decidis nomi Prof. Dron. Bujwid Honora Membro de UEA. (Aplaŭdo).

Sro. Prof. Dro. Bujwid kun emocia voĉo esprimas sian dankon pro ĉiu honoro kaj rekono. Li petas konservi agrablan memoron kaj forgesi la mankojn. Malfacila estis la tasko de la LKK en tia mizera tempo. Li diras, ke ni ŝuldas dankon al ĉiuj aŭtoritatoj, la urbestro, la tramdirekto, la polico ktp. ktp., kiuj ĉiuj helpis al sukceso de la laboro, fine al la kunlaborantoj kaj aparte al sroj. Merchant, Kreuz, Karsch, Jakob, Schoofs kaj la familio Zamenhof. Ankaŭ la Ĉe-kurso estis granda sukceso. Al ĉiuj ni ŝuldas multan dankon.

Sro. Kreuz legas telegramon el Varsovio, kie la LKK de l'postkongreso atendas la samideanojn.

Sro. Sapiro ripetas sian inviton por la postkongreso en Bialistoko.

Sro. Schoofs (kiu hodiaŭ festas sian 25 jubileon de Esperanto) dankas al Prof. Bujwid pro la oferema laboro. Li alvokas al kora kunlaboro inter la Naciaj Societoj kaj UEA kaj petas ĉiam memori pri la vorto : Konkordo. Li dankas kaj gratulas al sro. Merchant pro la bonega gvidado de la kunsidoj. Li finas per la voko : Longe vivu Merchant !

Sro. Merchant respondas kun danko, ke li kredas en sia profundo, ke Esperanto estas la plej granda donaco de genio al la homaro. Oni enpuŝis min en miajn oficojn kaj honorojn (li diras) sed mi esperas, ke mi ankoraŭ estas simpla ano de la movado. Mia deziro estas, esti justa al ĉiu homo. Esperanto kreskas kaj floras. Mi esperas, ke post via reveno hejmen, vi havos belajn memorojn ne nur en la cerbo, sed ankaŭ en la koro. Parolu pri tio. Esperanto meritas la plej grandan laboron, kiun oni povas fari.

Sro. Prof. Dro. Bujwid gratulas al sro. Warden, kiu ĉeestis ĝis nun ĉiujn univ. kongresojn kaj batas rekordon per tio. Li ankaŭ dankesprimas al la samideanoj el malpli proksimaj landoj kiel Japanujo, Usono kaj krome al sro. Joseph R. Scherer.

Sro. Merchant dankas al la ICK-anoj, KR kaj UEA pro ilia daŭra kunlaboro. Li krom tio mencias la meritojn de la oficistoj de la movado. Ili estas pagataj, sed ni donas al ili nur la nepre necesan por vivtenado. Admirinda estas la laboro de sro. Kreuz, kiu havas nur unu helpantinon. Li plenumas siajn devojn je la kontenteco de ĉiuj, kiuj lin konas.

Sro. Kreuz kortuŝite respondas, ke li faras nur sian devon. Lia unua deziro estas servi. Se li povis fari multon, dankon ankaŭ ŝuldas pro tio tiuj, kiuj kunlaboris en tio. Se kelkfoje li aperas kvazaŭ aŭtomata maŝino, se li kelkfoje devas esti mallonga en respondoj dum la kongreso, tio okazas pro neebleco respondi ĉion detale kaj ripete, ĉar li estas treege okupita. Li tamen ĉiam estas je la dispono de ĉiuj kaj deziras ĉiam laŭeble kontentigi ĉiujn.

Sro. Hasselbach dankas en la nomo de la Blindula Kongreso precipe al la LKK kaj ICK pro la donita helpo. Li proponas zorgi, je Esperanto estu enkondukata en ĉiuj blindul-institutoj.

Sub streĉa atento de la kongresanaro suriras la pupitron *sro. Feliks Zamenhof*, frato de nia majstro por diri adiaŭajn kaj admonajn vortojn.

Li diras : Ĝenerala kiam venas al ni gastoj, ni klopodos kontentigi ilin kiel eble plej. Laŭ tio, kion oni aŭdis kaj vidis, oni povas konkludi, ke la gastoj sin sentis bone. Kompreneble me ekzistas iu, kiu povus kontentigi ĉiun.

Kritiko bona ĉiam estas bona. Troa optimismo malhelpas. Danĝera tamen estas troa pesimismo. Tiel oni nun daŭre plendas, ke la esperantista organizo ne estas bona, ke la rilatoj ne estas bonaj ktp. Oni deziras reorganizi, ŝanĝi, serĉi « novajn vojojn ». Sed anstataŭ unu haoso oni ne faru du haosojn. Ni ne agu dise, sed kune. Ne ĉiuj vojoj kondukas al Romo, nur la bonaj. Ni bezonas gvidcentron !

Multaj timas, ke Esperanto de tempo al tempo havas novan konkuranton. La ĝisnuna ekzistado de Esperanto pruvis, ke ni ne bezonas timi ion. Esperanto estas bona kaj jam konata tra la mondo. La fideleco al la fundamento de la lingvo gardas kaj ŝirmas ĝin.

Sro. Zamenhof esperas, ke la kongreso donos novan revigligan ekpuŝon al la movado en Polujo. Li petas, ke la kongresanoj en siaj rememoroj ne metu la polajn samideanojn en la lastan vicon.

La kongresanoj per longa aplaŭdo kvitanas la belajn kaj elkorajn vortojn de sro. Feliks Zamenhof.

Sro. Merchant tion faras aparte per kelkaj amikaj vortoj. Post tio li deklaras la kongreson fermita per la voko : Ĝis revido en Parizo, Vivu Esperanto !

La kongresanoj kune kantas la himnon « La Espero » kaj iom post iom disiras.

Fino : 12,10 h.

INTERNACIA POSTKONGRESO EN VARSOVIO

9. 8. - 11. 8. 1931

(sub la aŭspicioj de ICK)

Soleno ĉe la tombo de Dro. Zamenhof.

La 9 Aŭgusto, matene je la 11 h. la samideanoj kuniĝis sur la hebrea tombejo ĉe la tombo de Dro. Zamenhof. La soleno komencis per depono de florkrono en la nomo de la postkongreso. Poste sro. Oberotman en la nomo de la Universala Homama Asocio deponis belegan florkronon sur la tombo.

Impresigan enkondukan paroladon faris sro. Leon Belmont. En la nomo de la Juda Komunumo parolis Prezidanto sro. Farsztejn, en la nomo de la Amikoj de l'Ligo de Nacioj eksministro sro. Lednicki. Sro. Rob. Kreuz per profundaj vortoj riverencis honore en la nomo de ICK kaj de la tuta esperantistaro antaŭ la tombo, kovranta la majstron. Poste sekvis alparolo de reprezentantoj de 20 nacioj, el kiuj kelkaj parolis kortuŝige. La soleno finiĝis per kanto de la Himno « La Espero ».

Malkovro de Memor-tabulo ĉe la Domo de Dro. Zamenhof

Post la soleno ĉe la tombo ĉiuj postkongresanoj iris al la strato Zamenhof N° 9, la domo, en kiu Dro. Zamenhof loĝis dum multaj jaroj. Sro. Belmont en la nomo de la Organiza Komitato transdonis la memortabulon al la zorgo de la urbo. Magistratano Dro. Bychowski post tio per kelkaj ceremoniaj vortoj en pola lingvo malkovris la tabulon kun danko al la esperantistoj. La teksto en pola lingvo estas :

En tiu ĉi domo loĝis Dro. Ludoviko Zamenhof,
Kreinto de la lingvo internacia Esperanto.

Poste kiel reprezentanto de la I.C.K. Sro. Kreuz direktis impresigajn vortojn tiel al la ĉeestintaj reprezentantoj oficialaj, kiel al la ne-esperantistoj.

Div. plezur-arangoj, gvidado, ekskurso ktp. finiĝis la postkongreson.

II. INTERNACIA POSTKONGRESO EN BIALISTOKO


12. 8.-13. 8. 1931

(sub la aŭspicioj de ICK)

Soleno de Zamenhof-Monumento

La 12 Aŭgusto je la 11,30 h. okazis soleno ĉe la loko de la estonta monumento antaŭ la komenco de la grandega urba arbaro sur ronda placo ĉe kruĉiĝo de 6 stratoj.

Ĉe alveno de la Vicvojevodo sro. Zawistowski la militista orkestro bonvene ludas marŝon. La vicvojevodo kaj div. aliaj reprezentantoj poste subskribas la dokumenton pri la fundamento-metado. La akto estas arte skribita de grafikisto sro. I. Tynowicki, membro de la organiza komitato, sur pergameno en du lingvoj pola kaj Esperanto. Ĝi tekstas :



Teksto de la Dokumento :

« En la vojevoda urbo Bialistoko en la jaro mil naŭcent tridek unua post Kristnasko, de Rtria post revivigo de Sendependa Polujo kaj la kvardek kvara post la apero de la unua lernolibro de lingvo internacia Esperanto, la dekduan de Aŭgusto, kiam la Prezidanto de la Pola Respubliko estis profesoro Ignacy Moscicki, la Unua Marŝalo de Polujo Jozef Pilsudski, la Prezidanto de la Ministraro Aleksandro Prystor, la Vojevodo Bialistoka Marjan Zyndram-Koscalkowski, la Starosto Urba Jan Mieszkowski, la Urba Prezidanto Wincenty Hermanowski, Prezidanto de la Urba Konsilantaro Prof. Roman Mlynski, Prezidanto de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado John Merchant, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Eduard Stettler, la Prezidanto de Pollanda Esperanto-Delegitaro Prof. Dro. Odo Bujwid, Ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio por Pola Teritorio Jakob Ŝapiro, okazis en la ĉesto de Regnaj Aŭtoritatoj, Reprezentantoj de la Socio kaj eksterlandaj gastoj SOLENA ENTE-

RIGO sur tiu ĉi loko de fundamenta ŝtono sub Monumento por Dro. Ludoviko Zamenhof, kreinto de la Helpa Lingvo Internacia Esperanto, naskiĝinta en la jaro mil okcent kvindeknaŭa en Bialistoko, laŭ projekto de artisto-skulptisto Abrahamo Ostrzega de la ĉefurbo Varsovio ».

Subskriboj : Zawistowski, Vicvojevodo Bialistoka, Jan Mieszkowski, starosta urba, St. Michalowski, starosto distrikta, Ing. Wasowski, direktoro de vojevoda oficejo por publikaj laboroj, Dro. Leon Zamenhof, Rob. Kreuz, L.K., direktoro de I.C.K. Genevo, J. Ŝapiro, ĉefdel. de UEA kaj Prez. de Organiza Kom. de Zamenhofs Monumento, Dro. Maksimilano Ziemilski, vicprezidanto de la urbo, Rychter, majoro, Krzyzanowski, kavaleria kapitano, F. Switalski, prezidanto de Financa Ĉambro, Dro. A. Rajdrozki, vicprezidanto de la Urba Konsilantaro.

Poste la vicvojevodo sro. Zawistowski de la tribuno faris festan alparolon al la ĉeestantoj, memorante la meritojn de Dro. Zamenhof kaj esprimante la feron, ke li estis Bialistokano. Ĝuste sur tero pola la monumento rajtas stari kiel simbolo de interkompreniĝo, ĉar tiu ĉi ideo estas vaste adorata en Polujo.

Li finis per la esprimo de deziro, ke al la monumento de Zamenhof, sekvu alia monumento, kreata de la ĉeestantoj mem, per disvastigo de la ideo de Zamenhof por la realigo de plej altaj idealoj de la homaro.

Sro. vicurbestro Dro. Ziemilski en la nomo de la urbo esprimis la dankon al la komi dispotato por niĝo de tia bela verko al la urbo kaj plue al la eksterlandaj gastoj pro ilia veno al Bialistoko.

Sro. Rob. Kreuz, direktoro de ICK, en la nomo de la I.C.K. kaj la esperantistaro esprimis la dankon al la patrolando de Zamenhof, la lokaj aŭtoritatoj kaj al la organiza komitato pro la deca honorigo de la genia aŭtoro de Esperanto.

La vicvojevodo sro. Zawistowski tiam emasonigis la supre menciitan akton, metitan en duoblan tubon kaj metis la unuan brikon por la fundamentado. Samon faris la reprezentantoj de la urbo kaj de l'ŝtato, Dro. L. Zamenhof kaj F-ino Lidja Zamenhof, sro. Kreuz, direktoro de ICK kaj la div. naciaj delegitoj.

La soleno finis per kanto de la himno « La Espero », akompanita de la orkestro de l'42 Pafista Regimento. La soleno estis tre impresiga kaj forte emociigis ĉiujn, tiel la esperantistojn, kiel la publikon.

Post la tagmango kaj vizito de la naskiĝdomo de Dro. Zamenhof okazis je la 18 h. solena postkongresas kunsido, en kiu prenis la parolon sro. J. Ŝapiro, Sro. Raczynski, vojevoda administracia fakestro, vicurbestro Dro. Ziemilski, sro. Rob. Kreuz, direktoro de ICK kaj Dro. L. Zamenhof.

Sekvis al tio mallongaj salutoj de naciaj reprezentantoj en nacia lingvo kaj en Esperanto.

La postkongreso finis per div. plezur-arangoj, ekskursoj ktp. laŭ speciala programo.

Kristnasko en Arnhem

Kunveno en Esperanto-Domo kun ekzamenoj,
prelegoj k.t.p. Malkara restado.

Petu informojn de :

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto,
Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.

Aktualaĵo por la gazetaro Aktivuloj helpu

Internacia Gazetara Komisiono, komisiita de ICK. informas :
Por ebligi kolekton de taŭga dokumentaro pri uzebleco de Esperanto por praktikaj celoj kaj la efikon de la tutmonda organizo de nia movado, ni petas disvastigi tra la gazetaro la sekvantan noton :

La princlando Lihtenŝtejno Novaj poŝteldonoj

• Jus aperis novaj oficialaj poŝtkartoj kun interesaj bildoj de la princlando, kiu altiras pli-kaj-pli turistojn al la belegajoj de sia teritorio. La dua eldono konsistas el 2 serioj de 10 kartoj po 10 & 20 centimoj kun belegaj bildoj el la lando. La klariga teksto de la karto estas redaktita en germana kaj Esperanto-lingvoj. Per sia dukolora presilo ĝi estas novaĵo en la kampoj de tipografio kaj filatelio. La desegnaĵoj kaj fotoj estas majstra verko de konata viena artisto, Kortega Konsilisto Kosel, kreinto de multaj poŝtmarkeldonoj. Aparte rimarkinda estas la uzo de Esperanto kiel helplingvo, kiun la registaro adoptis jam en 1930 sur alia eldono por sia turisma propagando. Lihtenŝtejno estas facile atingebla el Svislando, Germanujo, Aŭstrio, Italujo, sed ankaŭ por turistoj el aliaj landoj, per sia situacio ĉe la internacia fervoja linio Parizo-Vieno.

La antaŭe nomitaj kartoj ankaŭ aperis sen bildoj, sed per siaj poŝtmarko-desegnoj restas rimarkindej. »

Ni petas ĉiujn aktivulojn tuj disvastigi la noton. La titolo povas esti ŝanĝata laŭ la cirkonstancoj. Rekomendinde estas nenion aldoni al la faktoj mem.

Oni sendu 2 ekzemplerojn de ĉiu gazeto (noto kaj titolpaĝo datum nepre necesaj) al « Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado », 11, rue du Mont-Blanc, Genève (Svislando).

Ĉiuj sendaĵojn la oficejo de ICK kvitancas per oficiala poŝtkarto de la nomita serio. Por pluraj gazetoj plia(j) karto(j) estas sendataj.

Havigu al vi taŭgan propagandilon per kunhelpo. Estas grave, ke la materialo enhavu represojn el kiel eble plej multaj lingvoj kaj landoj. La Komisiono anticipe dankas kore pro la valora helpo.

Propagando per Lumbildoj!

Ĉu ekzistas ia organizaĵo, kiu pruntedonas Esperantajn lumbildojn? Ne. Tial estas plej urĝe efektiviĝi projekton: kolekti interesajn lumbildojn aŭ fotojn el la Esperanta vivo, kiuj montras la disvastiĝon de nia lingvo en plej diversaj randoj, medioj, kontinentoj: inter infanoj, japanoj, komercistoj policistoj ktp., bildojn kaj scenojn de kongresoj, monumentoj, foriraj Esperantaj standoj, turistajn kaj sportajn bildojn de Esperantaj faldboartistoj, piedpilkistoj, filmsteloj Esperantaj ktp. ktp.

Estas konata fakto, ke vi sukcesos pli bone, se vi ilustras vian publikan propagandan paroladon per interesaj bildoj el la Esperantista vivo. Ni urĝe kolektas taŭgan materialon, ankaŭ ne tute aktualajn fotojn, por fabrikigi 60-80 lumbildojn (por kiuj ni verkos specialan propagando-paroladon en Esperanto). Tiamaniere ni intencas fondi « migrantan lumbildokolekton », kiun ni pruntedonos al ĉiu serioza propagandisto kontraŭ malalta pago aŭ laudezire vendos tutan kolekton al Esperantaj organizaĵoj.

Por efektiviĝi nian projekton plej baldaŭ, ni petas ĉiujn Esperantistojn kaj Esperantajn organizaĵojn, precipe redakciojn sendi al ni tuj interesajn fotojn el siaj arĥivoj, laŭ kiuj ni farigos lumbildojn, la fotojn ni resendos aŭ aĉetos de vi laŭ interkonsento. Ni deziras fondi internacian arĥivon de Esperantaj lumbildoj kaj servi ĉiujn Ĉe-instruistojn, grupojn, propagandistojn ankoraŭ en tiu ĉi vintro! Tial tuj skribu al ni!!! Fratoj Fethke, Bydgoszcz-Polujo, Petersona 12.

Esperanto per Svisa Radio

La svisaj esperantistoj, kiuj helpis antaŭ sep jaroj la fondon de la Geneva Radio-stacio ricevis publikan dankon ĉe la solena inaŭguro de ĝia nova koncertejo la 28an de Oktobro. La reprezentantoj de la registaro kaj estraro de Radio-Genève memorigis al kuraĝa komenco kaj bonvenigis D-ron Privat kiel « junan prapatron » de la stacio.

Sed la plej kontentiga rezultato estus la fakto, ke la Esperanto-kurso de S-ro Paul Bouvier, UEA delegito, ĉiujnaŭde je 19 h. 20 vespere farata Radio-Genève, estas de nun prenata kaj dissendita de la potencia svisa stacio en Sottens (Radio-Suisse Romande, 403 m.) kaj tiamaniere aŭdebla en tuta Eŭropo.

Jaŭdon 3 Decembro je sama horo parolis Andreo Ĉe per tiu stacio. Liaj geamikoj en multaj landoj ĝojis lian voĉon.

Esperanto ĉe Brita Parlamento

Ĉe la malfermo de la Brita Parlamento, la deputitoj diskutis la novan deklaron de la Reĝo kaj speciale la financon problemon (*House of Commons* 11 Novembro 1931). Tiam Sinjoro Winston Churchill, la fama konservativa eksministro, diris: « Mi esperas, ke la registaro iniciatos internacian agadon, organizos konferencon kaj uzos sian tutan influon por instigi la landojn, kiuj amasigis oron, ke ili reobligu, ke ĝi servu al sia funkcio kiel normo de valoroj, aŭ alie, se tio ne estas ebla, ke oni klopodu starigi tion, kion mi emus nomi ia *esperanto-sistemo*, bazita sur la sterlinga funto. »

La uzo de la vorte *Esperanto* por signifi internacian normon estas tre interesa kaj oftigas en anglaj ĵurnaloj kaj noveloj lastatempe. Pri la ideo mem, la plimulto de hodiaŭaj esperantistoj jam nescias, ke antaŭ la milito, ĉiuj niaj esp. gazetoj, eldonejoj kaj organizoj uzis la « *spesmilon* », proponitan de D-ro de Saussure kaj valorante dekonon da funto.

Esperanto-Enciklopedio

En la lastaj jaroj aperis gravaj verkoj en Esperanto: Bibliografio, Plena Vortaro, Andréa, Originala Verkaro de Zamenhof, la verkoj de Remarque kaj aliaj imponaj eldonaĵoj.

La eldonejo *Literatura Mondo* decidis eldoni Esperanto-Enciklopedion, multe bezonatan verkon por Esperantistoj. Ĝi enhavos ĉion gravan pri la movado, historio, literaturo, propagando, gvidantoj ktp. de Esperanto. La verkego, kies bazo estas la valora manuskripto de s-ano I. Ŝirjaev, Ruslando kaj kiun redaktas S-roj V. Bleier, K. Kalocsay kaj L. Kókény, deziras esti modelo por kolektiva kreado per samideanoj el la tuta mondo. Pro tio la redaktoroj alvokas ĉiujn esperantistojn, interesigantajn pri tiu ĉi serioza laboro, prezenti siajn opinion, ideon, eĉ artikolojn al la redakcio. Ĉies opinio kaj ideo estas bone esplorata kaj observata por la intereso de la verko. La redakcio respondas al ĉiu en aparta fakto de Literatura Mondo ekde la numero januaro 1932. Tial individuan respondon neniu atendu! Ĉiujn korespondantojn sendu al:

Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mester-u, 53. V. 7.

“Esperanto - ĉambro”

en granda internacia pedagogia instituto!

Komence de ĉi tiu jaro estas malfermita en Mainz la « Institut für Völkerpädagogik » (Instituto pri pedagogio de ĉiuj nacioj) en la iama « Citadelle ». En la instituto estos montrata ĉio, kio koncernas la instruadon en la tuta mondo. Jam 50 ĉambroj estas komplete aranĝitaj; oni instalos ankoraŭ 100 aliajn ĉambrojn. Pedagogoj ĉiutandaj vizitas tiun instituton.

Estos aranĝita speciala « Esperanto-ĉambro ». Unufoje okazas, ke en granda pedagogia instituto estos montrata ĉio, kio koncernas « Esperanton kaj lernejon ». La subskribinta ligo estas komisiita de la direktoro de la instituto kompili la materialon por tiu « Esperanto-ĉambro ». Por ke ĝi estu vere internacia ni petas ke ĉiuj, kiuj havas taŭgan materialon sendu ĝin al ni. Dezirataj estas Esperanto-lerneolibroj kaj — vortaroj en ĉiuj lingvoj, kopioj de dekretoj pri Esperanto-instruado en lernejoj ktp. Se ni ricevos sufiĉe da materialo, la Esperanto-ĉambro jam estos finaranĝita kiel eble plej baldaŭ. Pro tio ni petas: Sendu tuj la materialon. Ni kore dankas.

Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo. Wiesbaden (Germanujo) Walkmühlstr. 25.

LA

MEMORON

PLIFORTIGAS

laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio. Profesoro de mnemoniko D. FAJNŜTEJN, VILNO, Zawalna 15 /Polujo/. Por anoj de U.E.A. speciala rabato. Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga kurso en Esperanto.

Al la Esperanto Gazetaro

La Internacia Scienca Asocio ĵus publikigis broŝuron entenan-
tan la *Sciencon Fundamenton*, aperintan laŭ sinsekvaj partoj en ĝia
Bulteno dum la lastaj monatoj.

Tiu 100-paĝa broŝuro enhavas tekston, kiu prezentas elementan
didaktikan resumon de la matematikaj, fizikaj kaj naturaj sciencoj,
kun laŭalfabeta tabelo de la vortoj.

Pro ilia malgranda nombro (nur 100), ni ne povas sendi ekzem-
plerojn por cenzo; pro la sama motivo la samideanoj, kiuj deziras
aĉeti tiun verkon, ne prokrastu mendi ĝin al S-ro ROUSSEAU,
2, rue Alfred de Vigny, Bécon-les-Bruyères (Seine) France, sendante
samtempe la prezon, t.e. 1 dolaron aŭ samvaloran sumon. I.S.A.E.

Oni dankas

*** S-ino Rivière el Toulon Anino 31479 dankas kore al S-ro
Marseille, ĉefdelegito en Paris por plenumita servo kaj al S-ro Zimmer-
mann, D en Colmar por afabla akcepto kaj gvido.

*** S-ro G. Baïre, Delegito & honora membro en Boulogne-sur-
mer dankas: S-rojn E. Wynisstorf, delegito, E. Müller & Sam. Moser,
en Zürich; — S-rojn Bassi, en Lugano; — Pedrazzini, en Locarno;
& Stroele, en Neuchâtel, pro gravaj servoj faritaj dum vojaĝo.

*** S-ro E. Rytemberg, VD en Warszawa, plej kore dankas al
S-roj Link kaj Braun en Heidelberg, S-ron Jos. Graef kaj fianĉinon
en München, F-inojn Anny Lich, Grete Kellermann kaj Dora Hos-
towsky S-ron Ĉefdelegiton Bernfeld, S-ron Hovorka en Wien pro
granda helpo kaj samideana afableco dum vojaĝo.

*** D-ro Walter Lippmann, Leipzig, dankas al la delegitoj de
UEA S-ro Stevan Vidak, Novisad, David Kremer, Košice, Paŭlo
Balkanyi, Budapest, J. Šapiro, Białystok, D-ro Isajo Fragner, Wisnicz
por tre utilaj informoj kaj precipe al S-ro Wiemers en Norderney,
posedanto de du bonegaj pensioj, pro lia vera samideana afableco
kaj amika konduto, kiuj multe plibeligis la ferian restadon en la fama
banko de la Norda Maro.

Niaj Mortintoj

*Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj
samideanoj. Al la familioj ni sendas la esprimon de niaj respekt-
plenaj kondolencoj.*

S-ro Friedrich Meyer, Delegito en Frauenstein, Erzgebirge, German.
Nov. 1931.

D-ro Alfred Großhahn, ano de UEA 29350 en Berlin.

F-ino Priscilla Hannah Peckover, Wisbech, Anglujo, 8.9.31., dumviva
membro de UEA kaj de la B.E.A., malavare subtenis nian kaj
multajn aliajn movadojn. Grandparte al ŝi ni ŝuldas la eldonon
de la Biblio en Esperanto.

S-ro Stanislav Tomich, kroata samideano malnova ano de UEA,
8.5.1930 en San Francisco de Anzolo, Ekvadoro.

S-ino Ljubica Trkulja, edzino de S-ro Danilo Trkulja, ano de UEA en
Mostar, Jugoslavio, 4.11.31.

S-ro V. Didrikson, Dumviva ano 119, en Odessa, laŭ reveno de l'revuo
Novembro 1931.

S-ro A. W. T. Berkley, Ano 15831 en London, 3.6.31.

S-ro C. P. Blackham, Ano 11244 en London, 19.7.31.

S-ro Mailo, Ano de UEA en Shanghai Aŭgusto 1931.

S-ro Eĉeno S. Cian, aŭtoro de esperanto-lernolibroj por ĉinoj, Aŭgusto
1931.

Sinceran kunsenton!

Ni promesis	16 paĝojn
Ni donas	24 paĝojn
Ni baldaŭ donos	32 paĝojn

de Literatura Mondo
se ankaŭ vi plenumas la devizon

Abonu ĝin.

Korespondado

Interŝanĝo de objektoj.

Aix-en-Provence (Francujo). — Profesoro Giraud. Avenue Pasteur
Les Tilleuls, nur pri senlaboreco k.ĉ.l.

Arad (Ruman.). — S-ro Ludoviko R. Szilagyi, Str. Miron Costin 7
PM. nur eŭropajn kun seriozaj filatelistoj, bazo Michel aŭ Yver
1932 sed ne malpli 15-20 Rmk aŭ 90-120 fr. Fr. Sendu rekomendite
Antverpeno-Berchem (Belgujo). — S-ro R. Torremans, Amethiststr
13 : PI. kaj 50, 100 PM. kontraŭ la sama kvanto k.ĉ.l.

Barcelona (Hispan.). — S-ro E. Gorgues, Laforja 12, PI., bfl.

Buenos Aires (Argentino). — S-ro Rodolfo G. Bosch, str. Estado
Unidos 2540, PI., bfl., k.ĉ.l., akurate kaj nepre respondos.

Bydgoszcz (Polujo). — S-ro Jan Radzimski, str. Zygmunta August
20-5 kun gejunuloj ĉiulandaj. PI. pri sporto naturo k. turismo
Graz (Aŭstrio). — S-ro Hubert Reinisch, Grazbachgasse 11, PI. bfl.
fotojn k.ĉ.l. Angie, Esperante France, prefere kun junaj f-inoj.

Halle a.S. (Germanujo). — Franz Pfeiffer, fervojisto, Königstr. 57 III
L. PI. k.ĉ.l.

Hester (West. Australia). — S-ro H. G. Walker, Post Office. PI.
vidadoj de ĉefurboj, k.ĉ.l. PM. Aŭstraliajn kontraŭ aliaj de ĉ.
Kalgoorlie (West. Australia). — F-ino E. Marshall, Campbell Str
L. kaj PI. k.ĉ.l. tute ne deziras interŝanĝi PM.

Lodz (Pollando). — S-ro M. Pasamonik, str. Nowomiejska 26, PI.
k.ĉ.l. nepre resp.

Praha XIX. — S-ro Ing. Fr. Schneider, Podbabska 1426, PM., nu
eŭropajn. Ankaŭ aĉetas.

Rostock (German.). — S-ro S. A. Zdansky, Leonhardtstr. 19, PM
kun tuta mondo. Ne sendas unue, sed resp. kaj sendas ĉiam.

Schuerin (German.). — S-ro Heino Hirsch, hebreo, Grüne Strasse 10
L., PK., kun kredantoj pri ĉiu temo k.ĉ.l.

Skara (Sved.). — S-ro Gustav Nejquist, Box 80, PI., L., Fot-ajoj

Sofia (Bulgar.). — S-ro Cvetko Ivanov, Bul. Ferdinando I., L., PI
pri vivo kaj Esp. movado en ĉiuj landoj.

Takaoka (Japan.). — S-ro Naoni Rokuse Hjakuŝjo-maĉi 3, Tojama
Ken PI., L., bfl., k.ĉ.l. Ĉiam respondas.

Trieste (Italio). — S-ro Antonio Cosma, Via Angelo Emo 11, PM
laŭ Yvert.

Viipuri (Finnlando). — S-ro Veikko Loikas, Linnankatu 8, PM. k.ĉ.l.

Zeltini (Latvio). — S-ro Antons Lazdins, « Kropas s. PI., bfl., k.ĉ.l.

Zeltini (Latvio). — S-ro Karlis Zvaigzne « Ziemeļi », PI., bfl., k.ĉ.l.

Libroj estas bonaj amikoj

La Himno-disko farigu via bona amikino!
ĉar ĝi estas fleksebla, belaspekta,
bonsona, ĉarma, daŭre donas ĝojon!

Prezo : Dolaro 1. — afrankite.

Komercista Esperanto Unio Dresden-Radebeul
Postĉeka Konto Dresden 5988

Petoj kaj Proponoj

INTERNACIA KOMERCO

*Ĉu estas la kapitalo ? — Bonvolu vin turni al S-ro Walther Petzold
1 Hindenburgstr. Schleiz, Germanujo, Thüringen.*

*Filatelistoj. — Mi aĉetos aŭ interŝanĝos vinjn kromajn poŝtmarkoj
kontraŭ kovertoj aerpoŝtaj. Neniu kvanto tro granda aŭ tro eta
Mi aĉetas, vendas aŭ interŝanĝas. Ano Asocio de Filatelistaj Ameri-
kanoj. Frank Herget, 553 Suffolk St., Buffalo, N.Y., USA.*

*Filatelistoj. — Italiajn P.M. mi sendas por sama kvanto el vi
Lando; ne sendas unue. Enrico Bocciardo, Corso Torino 28-I
Genova (Italia).*

*Libertempo. — Kiu hungaro interŝanĝus kun mi la loĝlokon dum 1
venonta somero ? Mi estas 17 jara, studento kaj volas pliperfektigi
en la hungara lingvo. Skribu al : Max Rudolf Frey, Wien VIII
Alsestrasse 63a, Aŭstrio.*

*Presagentejo serĉas eksterlandajn korespondistojn kaj kunlab-
rantojn. Proponojn sendu al G. Keet, Rijkhof van Goensstraat 5
Hago, Nederlando.*

*Senlaboreco. — Kaŭzoj ? Eŝkoj ? Kontraŭstariloj ? Agado de polit-
kulj ? de privatuloj ? Granda en via lando ? Kiom da senlaboruloj
Kiel vivas ties familioj ? Skribu al Giraud, Ave. Pasteur, Les Til-
leuls, Aix-en-Provence, Francujo.*

*Slavek-adresanĝon. — Bonvolu noti al si mian novan adreson
Praha XI, Wiclifova ĉp. 1724. Ĉeĥoslovensko.*

La ilustrita semajna gazeto „Heroldo de Esperanto” en 1932 refoje pliperfektigota

Niaj ĉefaj rubrikoj kaj aldonoj :

Esperanto vivas (Kroniko)
Kreskas nia literaturo (Bibliografio)
Parolas la leganto (Libera Tribuno)
De mardo al mardo (Tra la Mondo)
Niaj leteroj el la tula mondo
Inler mikrofono kaj anteno (Radio-paĝo)
La regno virina (Virina paĝo)
Sur la kvin linioj (Muzika paĝo)
La romana paĝo enhavos en 1932 romanon el la plumo de fama nuntempa hispana aŭtoro

Nove aranĝotaj :

La bela mondo (Turisma paĝo)
La strigo (Paĝo por literaturo kaj arto)
Nia gazelo (Aldono por la junularo)
Nia lingvo (Survoje al konsilanta gramatiko)
Humoro, distro, ludo

Ĉiun duan semajnon unu premia tasko!

Ĉiun duan monaton unu enketo!

Nia Librofako eldonas valorajn verkojn, originalajn kaj tradukitajn el diversaj lingvoj. Speciale rekomendindaj estas la verkoj de E. M. Remarque: *En okcidento nenio nova*, kaj: *La vojo returne*, krom la unua mondkonflikto originale verkita en Esperanto de H. Haefker sub titolo: *Jarmiloj pasas*. En nia stoko troviĝas ankaŭ ĉiuj nuntempe haveblaj pli gravaj verkoj de la Esperanta literaturo. *Petu senpagan specimenon de Heroldo kaj senpagan ilustritan Librokatalogon!*

„Heroldo de Esperanto“ Köln, Brüsseler Strasse 94

Nun estas tempo aĉeti librojn ! -- Grava Prezo-Malaltigo !

SCIENCAJ VERKOJ

- Bennemann, Paul, Esperanto-Handwörterbuch. I. Teil: Esperanto Deutsch.**
Bindita 3.50
— **II. Teil: Deutsch-Esperanto.**
Bindita 6.50
- Trögel, Robert, Vom Kultur- und Bildungswert des Esperanto.** Zehn erziehungswissenschaftliche Aufsätze. Broŝ. 1.50
- Wüster, Eugen, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. I-a parto.** (Literoj A-Ĉ (ĉerizo)). Broŝurita 15.—
— **II-a parto.** (Esperantologiaj principoj A-B. Literoj Ĉ (ĉerko) -F (folio)). Broŝurita 15.—
— **III-a parto** (Esperantologiaj principoj C. D. E. Literoj F (folio) -I (iri)). Broŝurita 15.—
— **IV-a parto.** Literoj I (iri) -K (korno). Broŝurita 15.—
— **Unua volumo.** Enhavo: Antaŭparolo. Arango de la vortaro. Esperantologiaj principoj (66 paĝoj). Vortaro: Literoj A-J (432 paĝoj). Leda duobindaĵo. 50.—
— **Leda duobindaĵo por la Unua volumo aparte** 3.50
— **Maŝinŝafa Esperanto-Vortaro prielementa.** (La maŝinelementoj; maŝinoj; plej gravaj esprimoj el la konstruado kaj teknologio.)
Deutsche Ausgabe (Esperanto-Deutsch und Deutsch-Esperanto mit Zahlenverweisen) 1.—
— **Zamenhof-Radikaro kun derivaĵoj kaj fontindikoj.** Broŝurita 2.50
- Zamenhof, Dr. L. L., Originala Verkaro.** Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj. Paroladoj. Leteroj. Poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj de *prof. d-ro Dietterle*. Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de L. L. Zamenhof. Luksa tolbindaĵo 10.—

INSTRUAJ VERKOJ

(Lernolibroj, Vortaroj kaj Muziko)

- Bennemann, Paul, Internacia Kantaro.** Kolekto de 139 popolaj kantoj el 55 landoj, 7 esperantaj kantoj, rondkantoj, kant-salutoj kaj 3 famaj koncertarioj.
Tekstaro (16a-20 milo). Broŝurita 1.50
— **Muzika eldono.** (4a-6a milo). Broŝurita 4.50
- Bennemann, Paul, Tra la mondo.** Internacia legolibro. **I-a parto:** Por komencantoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj. Kart. 1.50
— **II-a parto:** Por progresintoj. Kun aldono de 4 kompanaĵoj 2.20
- Casari-Schreiberreiter, Esperanto-Lehr- und Lesebuch für österr. Hauptschulen u. f. d. unteren Klassen der Mittelschulen.** Staatlich approbiert. I. Teil: Unterstufe 1.50
- Degen, Arthur, Kleines Lehrbuch auch für Selbstunterricht.** 16-20. Tausend. 0.50
— **Esperanto-Lernolibro por popollernejoj.** Laŭ rekta metodo. **Unua parto:** Unua — dua lernjaro. Kun 42 bildoj. 2.—
- Dietterle, Joh., Esperanto:**
I. Sprachlehre. Kart. 0.50
II. Übungsstoff. Kart. 0.50
— **Wörterverzeichnis dazu** 0.40
- Goldschmidt, Thora, Bildotabuloj por la instruado de Esperanto.** 36 bildoj kun klariganta teksto, ktp. Tria eldono. Kart. 3.50 4.—

- Hirts Esperanto-Taschenwörterbuch.** Esperanto-Deutsch und Deutsch-Esperanto. Für den tägl. Gebrauch zusammengestellt und bearb. von A. Degen u.B. Kötz. 21.—30. milo Kart. 1.—
- Kreuz, Robert, Esperanto in Handel und Verkehr.** Ciutaga kaj komerca frazaro. Komerca korespondado. Varolisto. Komerca vortaro. Gramatiko. Esperanta-Germana. Kart. RM. 1.—
- Lippmann, Walter, Dr. Zamenhofs sprachliche Gulachten** — Lingvaj Respondoj — in deutsch. Bearbeitung mit Ergänzungen u. Erläuterungen. Kart. 1.50
- Stark, Emil, Elementar-Lehrbuch d. Esperantosprache.** 8. durchges. Aufl. Kart. 1.50
- Streidl, Georg, Esperanto-Lehrbuch für Volks- und Mittelschulen.** In zwei Teilen mit 30 Bildern.
Teil I: Unterstufe. 7., durchgesehene Auflage. Kart. 0.80
Teil II: Oberstufe. 2. durchgesehene Auflage. Kart. 0.80

BELETRISTIKO

- Delsudo kaj Laiho, Aŭstralio. Lando kaj popolo.** 31 ilustraĵoj, 1 landkarto. Luksa tolbindaĵo 4.20
- Dietterle, Prof. Dr. Joh., Zur Rechtfertigung des Esperanto gegenüber seinen Kritikern.** Broŝ. 0.25
- Dietterle, La Vendreda Klubo.** 11 diversaj originalaj artikoloj verkita de la «Vendredoklubanoj» en Leipzig. Broŝ. 1.50
- Forge, Jean, Abismoj.** Romano originale verkita. Broŝ. 1.75. Bind. 2.75
— **Saltego trans jarmiloj.** Romano originale verkita. Bindita 2.75
- Hankel, Marie, Sableroj.** Originalaj poeziaĵoj kaj prozaĵoj. Broŝ. 0.30
- Luyken, H. A., Stranga Heredaĵo.** Romano originale verkita. Broŝ. 3. Bind. 4.—
— **Pro Istar.** Romano el la antikva Babela historio. Originala verkita. Bind. 4.—
- Privat, D-ro Edmond, Historio de la lingvo Esperanto.** Unua parto: Deveno kaj komenco 1887 ĝis 1900. Kart. 1.60
— **Tole bind.** 2.50
— **Dua parto: La movado 1900 ĝis 1927.**
Tole bind. 6.—
— **Vivo de Zamenhof.** Kart. 2.50 Bind. 3.50
- Raimund, Ferdinand, La Malŝparulo.** Originala sorĉfabelo en tri aktoj. El la germana lingvo 1.—
- Steche, Dr. phil., Albert, Speisekarte.** Deutsch-Esperanto. Broŝ. 0.25
- Völkerbund, Esperanto als internationale Hilfssprache.** Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes 0.25
- Wagnalls, Mabel, Palaco de Danĝero.** (Rakonto pri Madame de Pompadour). El la angla originalo tradukis Edward S. Payson. Luksa tolbindaĵo ... 4.—
- Internacia Mondliteraturo**
Ĉiu volumo estas kartonita en arta kovrilo. Formato 15 x 19 cm. Prezo po volumo: RM 0.80. Duobla volumo: RM 1.60. Kvin sinsekvaj volumoj (1-5 ktp.) tole binditaj RM 4.—
Vol. I. Goethe, J. W. v., **Hermano kaj Doroteo.** Eposo idilia. El la germana originalo.

- Vol. 2. **Niemojewski, A., Legendoj.** El la pola originalo.
Enhavo: Antaŭparolo. Tentistoj. Majlaŭ. Admono, Du disciploj.
- Vol. 3. **Turgenev, I. S., Elektitaj noveloj.** El la rusa originalo. Enhavo: Antaŭparolo. Mumu. Bejin-Herbejo. Poemetoj en prozo.
- Vol. 4. **Raabe, Wilhelm, La nigra galero** El la germana originalo. Dua eldono.
- Vol. 5. **Hildebrand, El la «Camera Obscura».** El la holanda originalo.
Enhavo: Antaŭparolo. Anĉjo la ĉasisto. La maljunulejano rakontas sian historion. Malnova konato.
- Vol. 6. **Iroving, Washington, El la skizlibro.** El la angla originalo.
Enhavo: Antaŭparolo. Rip van Winkle. La fierajo de la vilaĝo. La fantoma flanko. La kampara preĝo.
- Vol. 7. **Chamisso, Adalberto de, La mirinda historio de Petro Schlemihl.** El la germana originalo.
- Vol. 8. **Stamatov, G. P., Nuntempaj rakontoj.** El la bulgara originalo.
Enhavo: Vilao apud la maro. En la tombejo. La estinteco. Pri unu anguleto de l'animo. Du talentoj.
- Vol. 9. **Salom-Alehem, Perec, Hebreaj rakontoj.** El la hebreaj originaloj.
Enhavo: Antaŭparolo. **Salom-Alehem:** La miraklo de «Hoŝano rabo». Ne estas feliĉo. Rabĉik. La trezoro. Legendo pri la kreado de l'virino. Aforismoj. k.a.
- Vol. 10. **Puŝkin, A. S., Tri noveloj.** El la rusa originalo. Enhavo: Antaŭparolo. Pikreĝino. Negblovado. La pafo.
- Vol. 11-12. **Ariŝima, T., Deklaracio.** Romano. El la japana originalo.
- Vol. 13. **Poe, Edgar Allen Ses noveloj e «Rakontoj de Mistero kaj Imago».** El la angla originalo.
Enhavo: Antaŭparolo. Liĝeja. La ovala portreto. La barelo da Amontilado. Kelkaj vortoj kun mumio. La homo, kiu troviĝis eluzita. La silento — Fabelo
- Vol. 14. **Balzac, Honoré de, La firmo de la kato, kiu pikludas.** El la franca originalo
- Vol. 15. **Doroŝevič, Vlas, Orientaj fabeloj.** E la rusa originalo.
Enhavo: Antaŭparolo. La fabelo pri fabelo. La kalifo kaj la krimulino. Kiel d' Hasan falis la pantalone. La malĝusta trafitaĵo kalkanoj. Historio de porko.
- Vol. 16. **Sienkiewicz, Henryk, Noveloj.** El la pola originalo.
Enhavo: Henryk Sienkiewicz. Lux ir tenebris lucret. La maljuna servisto Dioklo. Estu benita (Hinda legendo) La anĝelo.
- Vol. 17. **Strindberg, August, Insulo de feliĉuloj.** El la sveda originalo.
- Vol. 18. **Bertrana Prudenci, Barbaraj prozaĵoj.** El la kataluna originalo.
Enhavo: Antaŭparolo. La forlasita vojo. La kabanajo de la karbfaristoj. La kamentoj de la gastejoj. Josafat.
- Vol. 19. **Simunovič, Dinko, Ano de l'ringludo.** El la kroata originalo.
- Vol. 20. **Eekhoud, Georges, Servokapabla Marcus Tybout.** El la franca originalo
- Vol. 21. **Sadoveanu, Mihail, Nobela peko** El la rumana originalo.
Enhavo: Antaŭparolo. Nobela peko. Et arbaro Petriŝor. La sciigantoj.

RM 1.— = 10/42 USA-dolaroj = 1,25 sv. fr. Liverebleco kaj prezoŝanĝoj estas rezervataj.

Mendojn akceptas ĉiulandaj Esperanto-librejoj kaj la libroservo de UEA

ELDONEJO FERDINAND HIRT & SOHN, ESPERANTO-FAKO, LEIPZIG C 1 Salomonstr. 15